

# pola esperantisto

socikultura revuo de  
polaj esperantistoj

Fondita en 1906 • N-ro 1/2004 • ISSN 0032-2431

## ALVOKO AL LA KONKRETA LABORO

*Ni sidas sentaŭge, sence rezonas,  
Forlasu ĉi tiun rondeton elitan!  
La fortojn pli junajn movado bezonas,  
Ni iru la vojon celitan!*

Roman Dobrzyński  
TAMEN, n-ro 4/1967

1  
2004

# Enhavtabelo:

3 REDAKTORE – Kazimierz Leja

---

## HISTORIE

5 Zofia Banet-Fornalowa: *Isaj Dratwer (1905-1985) – dua parto.*

8 Roman Dobrzyński: *ADA – la migranta birdo.*

---

## FELIETONE

12 Paweł Wimmer: *Fina veko.*

---

## AKTUALE

13 Roman Dobrzyński: *Impresoj el Gotenburgo.*

14 [red.]: *Omaĝe al Lidja Zamenhof.*

15 UEA: *Nomumo de la nova Ĝenerala Direktoro de UEA.*

---

## LINGVA ANGULETO

16 Czesław Baranowski: *Praktika uzado de la prepozicio JE.*

19 Kazimierz Leja: *Ortografio de Esperanto.*

---

## ALIFLANKE

21 István Ertl, Zbigniew Galor: *Krepusko de paradigmo.*

22 Roman Dobrzyński: *Aŭtomata miskompreno.*

---

## LA MOVADO, KULTURO, TURISMO

24 Teresa Nemere: *STUDIO „P”.*

25 Bogusław Sobol: *16a Ekumena Esperanto-Kongreso.*

*... kaj aliaj aktualaĵoj...*

36 Stanisław Śmigielski: *Kiamaniere edukadi rasajn huliganojn?*

---

pola  
esperantisto

Socikultura revuo de polaj esperantistoj, aperas 6 fojojn jare. Eldonas: Eldonejo HEJME • <http://www.hejme.e-tools.pl> • Redaktoro: Kazimierz LEJA.

**Ĉiujn korespondaĵojn kaj kontribuojn sendu nur al la redaktoro:**

**PL 41-250 Czeladź, skrytka 59; retpoŝto: [esperanto@hejme.e-tools.pl](mailto:esperanto@hejme.e-tools.pl).**

**tel: (+48 32) 265 00 38**

Jarabono enlanda: 30,00 PLN pagenda al:

BRE Bank SA-mBank: 36 1140 2004 0000 3202 3141 1644.

Jarabono eksterlanda: 12,00 EUR pagenda al:

UEA-konto: <kazl-s> aŭ FEL-konto: <leja-t>

N-ro 1/2004 • ISSN 0032-2431 • Eldonkvanto: 250 ekz.

Kazimierz Leja

**P**asis la unua aper-jaro de renaskiĝinta *Pola Esperantisto*, kies celoj estis: provi ligi polajn esperantistojn, disjetitajn kaj dividitajn, ofte ne propravole, ne havantajn de pli ol 15 jaroj propran tutlandan revuon; proponi doni al ili la eblecon esprimi kaŝitajn dezirojn, talentojn, demandojn, kaj montri al la monda esperantistaro, ke malgraŭ ekonomie malfacilaj tempoj oni povas „iri la vojon celitan”.

Tiu speciala *misio* de la revuo devus evidentiĝi ankaŭ en ĝia enhavo: *PE* nek estas „informa bulteno”, nek „oficiala organo” de Pola Esperanto-Asocio, almenaŭ dum kvin sinsekvaj jaroj (laŭ skriba interkonsento inter PEA kaj la eldonisto), por ke membroj de aliaj asocioj kaj societoj povu trakti ĝin kiel „sian” revuon. Tamen la atentemaj legantoj povis konstati, ke *PE* enhavis ankaŭ multajn primovadajn, eĉ organizajn erojn: informojn, sciigojn. Al kelkaj legantoj tio tute ne plaĉis, pri kio ili ĝentile informis la redaktoron. Plimulto da enketitoj esprimis tamen tute malan opinion! Laŭ ili *PE* devas esti pli informa, movada, nuntempa, ktp. Interesaj estas ankaŭ opinioj, esprimitaj ĝenerale de eksterlandaj legantoj: *PE* estas por ili

interesa, abunda, enhavoriĉa!

Kontentigi ĉiujn estas malfacila tasko (oni eĉ diras, ke tio estas simple neebbla...). Tamen, mi provas tion fari, dank’ al via helpo. Unue, mi direktu miajn vortojn al kunlabora(o)ntoj: skribu pri valoraj, aktualaj temoj rekte al *PE*, kaj zorgu pri tio, ke ĝi estu la unua fonto de informoj! Ne sendu tekstojn (proprajn aŭ tradukitajn), kies longeco povus enuigi kaj torturi la legantojn! Se vi promesas konstante kunlabori aŭ eĉ gvidi iun rubrikon, plenumu tion ĝustatempe, pensante pri via respondeco.

Due, mi petas la legantojn: legu la revuon, pridiskutu ĝian enhavon (ekz. dum klubaj renkontiĝoj), esprimu viajn opiniojn, menciu trovitajn erarojn, ktp. rekte al la redaktoro, kaj provu trovi pli multajn novajn abonantojn, ĉar nur pli granda eldonkvanto povas garantii, ke *PE* iam fariĝos la monata revuo, eble dulingva, kontraŭ simila prezo.

Vole-nevole mi tuŝis la ekonomian flankon de eldonado. Pasinta jaro estis por *PE* deficita, kaj pro malgranda eldonkvanto, kaj ankaŭ pro tio, ke kelkaj legantoj ĝis nun ne pagis la abonkotizon. En la novan jaron ni eniras tiurilate kun malpli da espe-

ro: ne ĉiuj ĝisnunaj abonantoj reabonis la revuon. Ili ĉiuj ricevas *kredite* la unuan ĉi-jaran numeron, kaj estas petataj esprimi sian decidon. Venis ankaŭ tute novaj abonantoj, pro kiuj ĉiam mi ĝojas.

Pasinta jaro estis tre abunda de diversaj okazintaĵoj en la pollanda Esperanto-medio. Sukcesaj estis la aranĝoj, preparitaj de diversaj lokaj E-komunumoj. Pola gazetaro, radio kaj televido multfoje informis pri Esperanto, intervjuis esperantistojn, montris ilian aktivecon. Estis eldonitaj kelkaj novaj libroj en Esperanto, kaj pli multaj homoj komencis lerni la internacian lingvon i.a. pere de Interreto. Komence de la nuna jaro naskiĝis ankaŭ alia espero: Pola Esperanto-Junularo reaktiviĝis! Pri la detaloj legu interne de la revuo.

Pro antaŭa eldonritmo de *PE* en ĉi tiu numero vi povos ankoraŭ legi pri kelkaj eventoj, rilatantaj pasintan jaron. Kiel mi jam informis, nun la revuo aperados ĉiun duan monaton (februaro, aprilo ktp.); tio estas la kaŭzo, ke vi tiom longe devis atendi ĉi tiun numeron. Malgraŭ ĉiuj obstakloj, ankaŭ financaj, *PE* iom „dikiĝas”, pro aldono de 4 paĝoj por ĉiu eldono, kio permesos aperigi pli da materialoj.

Samtempe mi petas la organizantojn de Esperanto-aranĝoj: en la revuo mi ĉiam volonte aperigos *koncizan informon* pri koncerna okazintaĵo, tamen invitilojn, informilojn ktp., vi devas prepari propramane, por enmeti ilin kiel *aldonaĵojn* al la revuo (vidu

la ekzemplojn en lasta numero pasintjara), kaj sendi al la redakcio en ĝusta tempo (tio estas ĝis la 20a de januaro, marto, ktp.). Tio donos al ni ankoraŭ pli da spaco por kontribuadoj, kiuj preskaŭ de unu jaro atendas por aperigi ilin.

Fine de mia „prediko” mi volas instigi vin, karaj samlingvanoj, por pli fervora komuna agado. Baldaŭ okazos la Landa Kunveno de Delegitoj de Pola Esperanto-Asocio, kie — krom elektoj de nova Ĉefa Estraro — povos okazi ankaŭ serioza diskuto pri la estonto de nia organiza laboro, ties celoj kaj la rimedoj. Bone estus, ke krom delegitoj de PEA, venu ankaŭ reprezentantoj de aliaj E-organizoj en Pollando, por trovi respondojn je la demandoj: ĉu vi pensas pri unuigo de esperantistoj pli ol antaŭe? Ĉu vi vidas en tio ŝancon aŭ minacon por via agado? Ĉu ni, komune agante, ne estus pli fortaj kaj pli serioze traktataj pere de neesperantista medio?

Al tio aldoniĝas aliaj gravaj demandoj, kiujn certe la aktivuloj profunde tenas: kion fari, por ne ripeti proprajn erarojn, kaj tiujn de niaj antaŭuloj? Kiamaniere honorigi tiujn, kiuj dum „malfacilaj tempoj” de nia movado estis ofenditaj, vunditaj, pardonpetante ilin pro ne ĉiam deca konduto de iliaj „samideanoj” — por fermi por ĉiam la periodon de disiĝoj kaj rankoroj, kaj ekokupiĝi pri la pli bona estonto?

Amike,

via redaktoro

*Zofia Banet-Fornalowa*

## Isaj Dratwer (1905–1985) dua parto

**D**um la germana, nazia okupado, Dratwer kun la familio, samkiel ĉirkaŭ 400 miloj da aliaj samdevenuloj el Varsovio kaj de pluraj urbetoj de tiu regiono, estis enpuŝita al varsovia geto, ĉiuj destinitaj por neniigo... Neimageble, sed ankaŭ tie, en loko kiun oni povas nomi tera infero Dratwer provis ion fari sur kampo de Esperanto. Li estis iniciatinto kaj organizanto de konspiraj Zamenhof-solenajoj en 1940 kaj 1941. Li havis kontakton kun Zamenhof-familianoj, kiuj same ek troviĝis en la geto. Tiukaŭze liaj ĉi-rilataj informoj, por la esploranto de historio de tiu periodo estas netrotakseblaj... La nazioj kaptis lin post la fino de insurekcio de varsovia geto dum la frua aŭtuno 1943 kaj mirakle ne murdis lin surloke, sed lokigis lin en kelkaj laŭvice koncentrejoj. Dratwer apartenis al nur kelkaj juddevenaj pollandaj samideanoj, kiuj transvivis Holokaŭston.

Post reveno el koncentrejo li tuj ekagis por renaskigi, preskaŭ tute neniigitan Movadon. En 1945 en kelkaj lokoj de Pollando ekagis grupetoj de reanimantoj de E-movado. Nekredeble, sed efektive ankaŭ en preskaŭ en-

tute ruinigita Varsovio ekestis E-Komitato, kies prezidanto fariĝis prof. Mieczysław Kaus, kaj vicprezidanto mag. Isaj Dratwer. La Komitato plene apogis fondiĝintan aŭtune 1945 en Krakovo la Asocion de Esperantistoj en Pollando (AEP). Dratwer, konata de grandaj organizaj kapabloj, kontribuis signife al reapero de „Pola Esperantisto” en majo 1945. Li ankaŭ organizis kunvojaĝon de grupo de varsoviaj esperantistoj al la 1a Postmilita Pollanda Kongreso, okazinta en Lodzo, la 9–10an de junio 1946. Dratwer, Zawada kaj Czechowski ek troviĝis en la unua estraro de AEP tiam elektita... La 9an de sepembro samjare la varsoviaj aktivuloj akiris eblecon regule disaŭdigi Esperanto-elsendojn en Pola Radio, kiuj daŭris ĝis 1949. Dratwer grave kontribuis al kontentiga nivelo de la E-programoj.

Marte 1947 la Ĉefa Estraro, samkiel la redakcio de „Pola Esperantisto”, estis translokitaj el Krakovo al Varsovio. Tio ebligis pli facilan aliron al ĉefaj registaraj kaj partiaj instancoj, troviĝantaj en la ĉefurbo. Dank’ al tio oni eblis akiri pli bonajn kondiĉojn por funkciado de la Asocio. Nun la

prezidanto de AEP, samtempe la redaktoro de „Pola Esperantisto” fariĝis Jan Zawada, vicprezidanto R. Sako-wicz kaj Ĝenerala Sekretario Isaj Dratwer. Li plenumis tiun gravan funkcion, sen interrompe, ĝis 1958.

Neimageble sed efektive, la Ĝenerala Sekretario ĉiutage, post respondeca profesia laboro, deĵoris en la Societo ĝis malfruaj vesperaj horoj. Ĉi-loke valoras aldoni, ke la sidejo de la asocio ĉe strato Marszałkowska 81 konsistis el unu dekkelkmetra ĉambreto, kiun bonvoleme disponigis al la asocio s-ro Peretz. Pro manko de financaj rimedoj oni ne eblis laborigi tajpistinon nek purigistinon; tial Dratwer devis servi plej ofte ankaŭ por tiuj taskoj. Nur en 1954, periodo de politika malstreĉigo, AEP ricevis de la urbaj instancoj multe pli komfortan duĉanbran sidejon ĉe la strato Kozia 3. Dratwer, apogata de aro de fidelaj al Esperanto samideanoj, ĉefe antaŭmilitaj, efektivigis en tre malfacilaj kondiĉoj vastan aktivadon. La Movado progresadis: fondiĝis pluraj filioj, okazis 3 laŭvicaj Tutpolaj Kongresoj, aperadis — kvankam aspekte modesta — „Pola Esperantisto”, estis organizataj E-kursoj, okazis Zamenhof-solenaĵoj. La eta sidejo, servanta samtempe kiel klubo estis ĉiam plenplena; la E-vivo pulsas...

Tamen persisto, sindediĉo kaj granda organiza kapablo de Dratwer plene evidentiĝis dum stalinisma periodo, en la unua duono de la 50aj jaroj. Tiam en la t.n. orienta bloko, politike dependa de Sovetio, la ŝtataj kaj par-

tiaj instancoj konsideris Esperanton kosmopolitaĵo, do io nociva al la socialisma internaciismo. Malgraŭ aplikataj de la regantoj diversspecaj malheltoj, ne malofte reprezalioj, Dratwer restis surpostene. La movadoj por kaj per-Esperanta, kvankam en limigita dimensio daŭris seninterrompe, almenaŭ en du filioj: la varsovia kaj vrocłava. Daŭre en la sidejoj okazadis prelegoj, konversacioj, estis ankaŭ organizataj Zamenhof-solenaĵoj, aperadis asocia bulteno. Ĉio ĉi okazadis nerimarkite, sed regule...

Ekde la jaroj 1954–1955, pro demokratiigo komenciĝinta en la tuta sovetisma bloko, la situacio kaj kondiĉoj por E-movado fariĝis pli favoraj. La asocio plene profitis de tio, disvolviĝante plurkampan, eldonan, instruistan kaj organizan agadojn. La aktivularo plene rekonis netrotakseble grandajn meritojn de Isaj Dratwer por renaskiĝo kaj gvido de la Movado en tre malfacila por ĝi periodo. Tiukaŭze la Ĉefa Estraro antaŭmetis al la ŝtataj instancoj proponon honorigi lin. Tio efektiviĝis, kaj Dratwer estis en 1956 distingita per la „Ora Kruco de Merito”. La evento estis ne nur por la honorigo grava, sen entute por la Movado, ĉar unuafoje en postmilita periodo la ŝtato atribuis distingon pro aktivado surkampe de Esperanto.

De demokratiigo de la lando decidis profiti ankaŭ fortoj, kies celoj estis tute kontraŭaj al demokratiigo. Denove evidentiĝis, ke antisemitismo en kelkaj medioj detruige funkcias.

Isaj Dratwer kun la edzino Anna, same sindediĉa esperantistino, decidis en 1961 enmigri Israelon. Kun granda bedaŭro la varsoviaj esperantistoj adiaŭis lin. En la varsovia klubo estis organizita decembre 1960 sole-na adiaŭa vespero. Isaj Dratwer restis en danka memoro kaj koroj de pollandaj esperantistoj. En la informo pri tiu vespero estis skribite i.a.: „Dratwer estis unu de ĉefaj kolonoj de E-movado en Pollando dum ĝia malfacila periodo kaj ankaŭ en jaroj de la disvolviĝo. Li estis ĉiam gardema kaj dank' al liaj avertoj PEA sukcesis eviti grandajn malfacilaĵojn”. (PE n-ro 1, 1961, p. 4) Vere ne nur sindediĉo, persisto, organiza sperto, sed ankaŭ lia saĝo multe utilis al la Movado.


Veninte al Israelo, tuj li ekaktivis en tiea E-movado. Li aktivis plurkampe; ĝis 1968 li estis prezidanto de Esperanto Ligo en Israelo (ELI). Li ne ĉesis kontaktojn kaj kunlaboron kun pollanda E-movado. Inter ELI kaj PEA okazis interŝanĝo de asociaj revuoj. Okaze de la 20a datreveno de Pollanda postmilita E-movado li verkis valoran artikolon pri ĝia historio dum tiu dudeko, kiu aperis en „Pola Esperantisto” n-ro 4, 1965 j. Li estis tre aktiva internaci-skale, kunlaboris kun Centro de Dokumentado de UEA.

Isaj Dratwer estis kapabla diversĝenra verkisto. En antaŭmilitaj prestiĝaj revuoj, aparte en „Pola Esperantisto” kaj „Literatura Mondo” fojfoje aperadis liaj originalaĵoj kaj tradukaĵoj, ĉefe kun iu morala mesaĝo. Li verk-

is ankaŭ polemikajn artikolojn ligitaj kun la Movado, kun gravaj politikaj eventoj. Kun Zawada li kuntradukis monografion de Mieczysław Jastrun pri Adam Mickiewicz kaj monografion de Maria Ziółkowska „Doktoro Esperanto”. Li publikigis en 1949 por la bezonoj de renaskiĝanta pola E-movado broŝuron „W poszukiwaniu języka międzynarodowego” (Serĉante lingvon internacian). Al la plej konataj liaj verkoj apartenas: „Opinioj de eminentuloj pri internacia lingvo” kaj „Lidja Zamenhof. Vivo kaj agado”. Kune kun sia edzino Anna li verkis „Polajn-Espernatajn konversaciojn”.

Anna mortis en 1981 en Bat Jam apud Tel-Avivo, kie ili loĝis. Isaj Dratwer, elĉerpita pro koncentraj travivaĵoj kaj tre laborega vivo forpasis post longa malsano la 19an de aŭgusto 1985 en Tel-Avivo.

La tutan sian havaĵon li postlasis al E-Ligo en Israelo.

Grandaj estas meritoj de Isaj Dratwer por la E-movado entute, sed aparte li multe kontribuis al la pollanda. Tiukaŭze li meritas nian elkoran memoron. 

## ADA — la migranta birdo

**A**da Sikorska–Figiera estis homo–institutio, sed samtempe ŝi estis treege homa homo. Ŝia vivo sufiĉus por kelkvoluma biografio, sed ŝi lasis post si nur malgrandan broŝuron<sup>1</sup>.

### Esperantismo aplikata

En la jaro 1961 mi partoprenis Universalan Kongreson de Esperanto en Harrogate (Britio). Kvankam ĝi estis mia unua kongreso en eksterlando kaj la unua vizito al la „libera mondo”, plej forte fiksiĝis en mia memoro jena sceno. Antaŭ la kongresejo promenas du junaj, geedzaj paroj: gesinjoroj Grattapaglia kaj gesinjoroj Figiera, du italoj kun siaj edzinoj, respektive la germanino Ursula kaj la polino Ada. La unuan paron mi poste vizitis kelkfoje en Bona Espero (Brazilo). Ĉe la alia mi havis plezuron gastigi ofte en Madrido, kien mi venadis pro profesiaj kialoj. Ambaŭ paroj estis por mi modelo de la esperantismo aplikata. Ambaŭ virinoj kiel infanoj suferis simile pro la milito, kvankam ili troviĝis en kontraŭaj flankoj de la frontoj.

Kun Ada Sikorska mi konatiĝis en 1956 jaro, kiam ni ambaŭ partoprenis

la kurson de Esperanto gvidatan de la fama hungara poeto Julio Baghy. Post kelkaj lecionoj, kiel tipa komencanto, mi jam verkis poemon en Esperanto kaj montris ĝin memfide al „Paĉjo”. Li pacience korektis mian grafomaniaĵon; per ruĝa krajono li skribis super miaj versoj tute novan poemon. Kaj Ada tuj distingiĝis per babilado en Esperanto. Iom pli malfrue impetis preparoj por la centjara naskiĝdatreveno de Ludoviko Zamenhof kaj por la ĉeokaza Universala Kongreso de Esperanto en Varsovio. Pola Radio anoncis sensancian informon: ĝi decidis elsendi en Esperanto. Por tiu celo fondiĝis nova redakcio, al kiu ekde la komenco apartenis Ada.

### Esperantigo de la malfacila vorto

Unu jaron antaŭ la kongreso venis Varsovion nome de UEA konstanta kongresa sekretario, juna kaj ĉarma italo Gian Carlo Figiera. Foje li rimarkis: „Kial vi uzas la neprononcelan vorton «miłość», dum en la pola lingvo ekzistas vere belsona vorto «cielęcina»?”<sup>2</sup>. Baldaŭ la italo superis tiun ĉi lingvan problemon per la Esperanta vorto „amo”. 1959 post la jubi-



lea kongreso Gian Carlo kaj Ada iĝis geedzoj. Iliajn sinsekvajn loĝlokojn determinis UK-oj, kiuj laŭvice okazis en Bruselo, Harogate, Kopenhago, ktp. Kiam Gian Carlo ĉesis deĵori kiel KKS kaj fariĝis oficisto de la Monda Organizaĵo pri Turismo, gesinjoroj Fighiera setlis en Madrido. Fine de 1988 Gian Carlo emeritiĝis kaj la geedzoj definitive translokiĝis al Torino.

Ada „migradis” kune kun sia edzo 27 jarojn, sed jam multe pli frue ŝi estis la „migranta birdo”. Ŝi havis 10 jarojn, kiam la 1an de septembro 1939 la nazia Germanio invadis Pollandon. Kun siaj gepatroj kaj du fratinoj ŝi urĝe vojaĝis el Varsovio al Lvovo, kiu estis tiam unu el la tri plej gravaj urboj de Pollando. La patro, generalo Franciszek Sikorski apartenis al la komanda stabo de Lvovo. La 17an de septembro 1939, dum la pola armeo ankoraŭ batalis kontraŭ la germanoj, deoriente atakis Pollandon Sovetunio. Baldaŭ Lvovon eniris la „ruĝa armeo”, la polaj soldatoj estis internitaj, la oficiroj arestitaj kaj la civiluloj, loĝantaj en la terenoj okupitaj de la soveta armeo, amase deportitaj en Sovetunion. Inter ili estis la 11-jara Ada Sikorska.

### **De tajgo al minaretoj**

„De tajgo al minaretoj” titolas broŝuro, kiun Ada Sikorska-Fighiera verkis multajn jarojn pli malfrue surbaze de siaj leteroj, kiujn ŝi sendis al sia onklino en Pollando. Nur parte la leteroj atingis la adresiton. La broŝuro estas korskua raporto de la infano perfor-

te forpelita al Siberia ekzilo. Ŝi suferis la sorton de la proksimume du milionoj da poloj deportitaj en Sovetunion dum la jaroj 1940–41. La deportadoj estis fakte tiuspeca operacio, kiujn poste oni nomis „etna purigado”. La malgranda Ada estis „bonsanca”, ĉar ŝi dividis la teruraĵojn de la tajga vivo kune kun sia patrino kaj fratino Maria. La alia fratino, Krystyna, mortis pli frue dumvoje.

Junie 1940 Germanio atakis Sovetunion. Post unu jaro la komunisto Ruslando elĉerpis ĉiujn defendeblecojn. Savis ĝin la aliĝinta al la kontraŭgermana alianco Usono. Generalo Władysław Sikorski, la tiama pola ĉefministro rezidanta en Londono, sukcesis konvinki Roosevelt kaj Churchill, ke la kondiĉo de helpo al Sovetunio estu malliberigo de la polaj deportitoj. Julie 1941 Sikorski vojaĝis al Moskvo, Stalin devis akcepti la kondiĉon. Baldaŭ komenciĝis evakuado de la poloj el Sovetunio al Irano. Tiamaniere sukcesis eskapi nur iom pli ol 100 mil personoj. Granda plimulto da deportitoj neniam eksciis pri la interkonsento „Stalin-Sikorski” kaj restis por ĉiam en la perditaj anguloj de Siberio. Tiu pola holokaŭsto restas daŭre malmulte konata en la cetera mondo.

Ada ankoraŭfoje ĝuis bonŝancon, la sorto ŝparis al ŝi suferi unu plian vintron de la Siberia nordo kun 40-gradaj frostoj kaj malsato. Oktobre 1941 ŝia kampadejo estis evakuata suden. Duonon da jaro ŝi vagadis tra la „infe-

ra tero” por marte 1942 transpaŝi la limon de Irano. Dum la vojaĝo tra Sovetunio multe helpis la patrino kaj ŝiajn du filinojn la fakto, ke ili apartenis al la familio de generalo Sikorski. La nomon oni aŭtomate asociis kun la tiama ĉefministro Władysław Sikorski. Ada ne povis ankoraŭ scii, ke ŝia patro generalo Franciszek Sikorski jam ne plu vivis, murdita laŭ la ordono de Stalin kune kun la aliaj 20 mil polaj oficiroj inter alie en la fifama Katyń.

### La misio

Ses jarojn Ada Sikorska pasigis en Irano kaj Libano kune kun miloj da polaj senhejmuloj. Poste ŝi forveturis al Londono por fini sian mezlernejan studadon. Aŭtune de la jaro 1948 ŝi kun sia fratino Maria revenis al Pollando post dekjara vivo de la „migranta birdo”. Ŝi sukcese studis la polan filologion, eklaboris en libroeldonejo kaj iufoje trafis ŝin la kontaĝa bakcilo Esperanto...

Ada serĉis la sencon de la vivo ne tiom en, kiom per Esperanto. Ŝi realigis sian mision ĉefe per la redaktado de „Heroldo de Esperanto”. Ŝi aĉetis la faman dusemajnan revuon de ĝia fondinto Theo Jung en 1961 jaro. Ekde tiam Ada fariĝis institucio, aŭ homo-orkestro. Ŝi faris laborojn destinitajn por pluraj personoj. „HdE” liveris plej freŝajn informojn al plej malproksimaj anguloj de Esperantujo speciale en la Orienta Eŭropo, kie la esperantistoj povis pagi la abonon per siaj propraj valutoj. Ada tiamaniere fakte sub-

tenis la movadon en la tn. socialismaj landoj, ĉar la loka mono estis senvalora en la Okcidento.

Ne ĉie „HdE” plaĉis al politikaj instancoj. Apartan priskribon indas la provoko kontraŭ Ada muntita en Sovetunio laŭ la klasikaj metodoj de KGB, kiam oni imputis al ŝi spionadon. Fakte Ada laboregis tute senpage por „HdE”. Kiel ŝi agis, oni povas legi en la rememoroj de ŝia edzo<sup>3</sup>.

### Misuzoj de Heroldo

Mi akiris la broŝuron de Gian Carlo Fighiera laŭ nekutima vojo. En aŭgusto 2003 „Heroldo de Esperanto” publikigis artikolon atakantan UEA interalie pro distribuado de la „fifama intervjuo de Zaleski far Dobrzyński”. Kial mian libron „La Zamenhof-strato” oni povas nomi „fifama”? Ĉu pro tio, ke ĝi rememorigas teruraĵojn de la holokaŭsto, aŭ prezentas la Zamenhofajn ideojn, aŭ informas pri profesiaj sukcesoj de d-ro Zaleski-Zamenhof? Nu, mi jam scias, ke la nuna „HdE” havas nenion komunan kun la edzo de Ada, ke ĝi trafis per malhonesta ago en aliajn manojn. Tamen mi skribis pri la afero al Gian Carlo Fighiera. Responde li sendis al mi siajn rememorojn pri „Aduŝka”. Mi trovis tie nepre citendan alineon:


*Bedaŭrinde, post la forpaso de Ada la nova eldonanto [Valerio Ari ankaŭ konata kiel Giorgio Silfer — rim. de R.D.] perfidis sian propran promeson kaj utiligis „Heroldon” por personaj celoj: unue li senrajte ŝanĝis la skribe inter-*

*konsentitan kolofonon por forigi la vorton „Movado” el la subtitolo; due, li ligis la gazeton al kontraŭmovada teorio, kiu dividas la esperantistojn kaj kompromitas Esperanton; trie, subfosadis la organizitan movadon — kaj ĉefe UEA — (al kies honora membraro apartenis Ada), ĝiajn UK-ojn kaj Belartajn Konkursojn, uzante en siaj skribaĵoj plurajn kaŝnomojn. Trompi la lastan vojon de mortinto estas fia ago. Pro tio la transdono estis poste nuligita flanke de la transdoninta societo; la gazeto nun aperadas pirate.*

### **La lasta flugo**

La broŝuro de Gian Carlo estas korskua raporto pri forpaso de plej proksima persono. Ada, simbolo de la supernatura vogleco, forto, laboremo foriris subite. Sufiĉis du monatoj, nome junio kaj julio de la jaro 1996. Ŝia morto koincidis kun la Universala Kongreso en Prago, la unua UK ekde 1959, kiun ŝi ne ĉeestis. Oni okulfrape rimarkis ŝian foreston, ŝiaj amikoj sciis pri la malsano, sed kredis baldaŭ revidi ŝin, Ada ja estis nemortebla... Ankaŭ mi eraris.

Mi havis honoron aparteni al la gemika rondo de Ada. Pro ŝia fulmotondra aktiveco niaj renkontiĝoj estis mallongaj. Plurfoje ŝi konsentis, ke mi faru filmon pri ŝi. Kiam? Nu, kiam estos pli da libera tempo. Nun mi scias, ke Ada neniam havus liberan tempon kaj mi devis esti pli trudiĝema. Rilate al Ada aparte aktualas la vortoj de pastro-poeto Twardowski: „Urĝu ami la homojn! Tiel rapide ili forpasas!”

Mi ne hontas konfesi, ke kelkfoje larmoj ĝenis min legi la rememorojn pri la lastaj tagoj de Aduŝka. Tiu ĉi kromnomo estas la Esperantigita de Gian Carlo pola diminutivo Aduŝka (Adusia). Ĝi esprimas akcepton kaj admiron de la poleco de Ada fare de la edzo. En la broŝuro troviĝas kortuŝa plano de Ada koncerne ŝian viziton al Pollando post la okazonta resaniĝo. Estis detale planitaj renkontiĝoj kun la polaj familianoj kaj geamikoj. Tiel ŝi faris rutine, ĉar ĉiujare ekde 1959 ŝi revenis Pollandon. Ada modele harmoniigis siajn patriotismon kaj esperantistecon. En ŝia patriotismo, tiel peze elprovita, ankaŭ respreguliĝis la instinkto de la migranta birdo. Tiu ĉi instinkto devigis ŝin cikle reviziti la patrujon, kiu foje ŝajnis al ŝi por ĉiam perdita. 

1. Ada Sikorska-Fighiera *De tajgo al minaretaj Esperantotur*, Bydgoszcz 1991.
2. cielęcina (legu: cielencina) = bovidaĵo.
3. Gian Carlo Fighiera *La lastaj tagoj de Ada*, Adoŝka, Torino 2002.

*Paweł Wimmer*

## Fina veko

Mi eklernis Esperanton antaŭ 20 jaroj kaj dekomence traktis ĝin kiel utilan, tre facilan lingvan ilon — kontraŭe al multaj aliaj homoj, por kiuj la lingvo kaj movado estis antaŭ ĉio okazo por ekkoni aliajn homojn. Ni devas memori, ke homoj el ekster la „fera kurteno” ne povis facile vojaĝi eksterlanden, precipe al okcidentaj landoj. La Esperanta movado multe faciligis ja tiajn vojaĝojn. Esperanto ankaŭ ne estis por mi ideologio, ĉar mi ne ŝatas ideologiojn, speciale „finvenkismajn” — ili tro asociiĝis kun la komunismaj ideoj kiuj, onidire, ankaŭ devus iam venki...

Post 1989, post la simbola falo de la Berlina muro, tiu ĉi vojaĝa motivo ne plu ekzistas. Samtempe okazis la komputila revolucio, kiu ekde la 80. jaroj de la 20. jarcento igis la anglan lingvon absolute dominanta. Tiu ĉi tendenco fortikiĝis kune kun la ekapero de la Interreto, kie la angla estas natura lingvoponto. Ne pro deklaro de iu ŝtato aŭ internacia organizajo, sed pro la simpla fakto, ke ĝi estas portilo de la moderna kulturo, scienco kaj teĥniko. Junaj homoj, kiuj estas la plej entuziasmaj uzantoj de la novaj teĥnikaj iloj, perdis sian intereson pri „malnovaĵoj”.

Tio estas la ĉefa kaŭzo de la fakto, ke en Pollando ekzistas nun granda generacia truo en la Esperanto-movado. Multaj pli maljunaj esperantistoj restis fidelaj al la tradicia movado, sed ili restas ekster la moderna mondo de komputiloj kaj Interreto — pro sociaj kaj ekonomiaj kaŭzoj. Tiaj homoj al kutimiĝis grandparte al la tradiciaj ideologioj, kie la „fina venko” estas eterna celo kaj neevitebla fakto.

Paradokse, la nunaj teĥnikoj donas al Esperanto la ŝancon vere iĝi viva kaj alloga lingvoponto, ĉar ekzistas softvaro kiu ebligas skribi esperantlingvajjn TTTpaĝojn kaj partopreni en diskutgrupoj aŭ vivaj konversacioj. Aktualaj informservoj, artikoloj (ne nur priesperantaj sed antaŭ ĉio peresperantaj), kursoj de Esperanto (eĉ multimediaj), vortaroj, prelegoj, muziko, estonte eĉ konferencoj (kial ne?) k.a., estas laŭ mi la plej gravaj metodoj por allogi novajn generaciojn de junaj homoj. La estonteco estas moderna teĥniko. Fina venko mortis, necesa estas *fina veko* kaj aktiva laboro per novaj iloj.

*Intervjuo kun red. Roman Dobrzyński*

## Impresoj el Gotenburgo

### *Ĉu plaĉis al Vi la Universala Kongreso de Esperanto en Gotenburgo?*

Tre ege. Unue pro la interesa kultura programo, ĝi estis varia kaj profesieca. Bone kontribuis al ĝi Jerzy Fornal el Varsovio. Furoris la muzikgrupo „Esperanto–Desperado”. Ili estas veraj majstroj! Krome plaĉis al mi revolucia ŝanĝo de la dimanĉa programo, oni dediĉis ĝin por diskutoj pri la problemoj de la Esperanto–Movado. Tradicie la kongresaj dimanĉoj estis destinitaj por inaŭguroj, en kiuj ne povis partopreni oficialaj altranguloj, ĉar dimanĉe oni ne laboras. Laŭ tiu vidpunkto pli oportuna estas lundo.

### *Tamen la Universalaj Kongresoj estas ĉiam pli multekostaj kaj Svedio aparte famas kiel multekosta lando.*

Imagu Kazimierz, ke por ni poloj la Kongreso evidentiĝis malmultekosta. Svedio situas proksime, vojaĝkostoj ne estas grandaj. Oni timis kostojn de loĝado, bonŝance LKK ofertis amasloĝejon, kiu kostis nur 50 eŭrojn por la tuta semajno. La amasloĝejo havis kroman avantaĝon, ĝi situis najbare de la Kongresejo kaj ĉefe loĝis tie gejunuloj. En la amasloĝejo dominis etoso de ĝojo kaj amuzo. Ĝi kontestis la

opinion, ke la movado maljuniĝas. Cetero en la amasloĝejo dormis ne nur „malriĉaj” poloj, sed ankaŭ „riĉaj” germanoj, japanoj, kanadanoj kaj aliaj. Mi ne suferis komplekson.

### *Ĉu Vi ĝuis sukceson?*

Efektive, mi ĝuis „miajn kvin minutojn” eĉ ne sola, sed kune kun d-ro Zaleski–Zamenhof. Nia libro „La Zamenhof–strato” estis oficiale deklarita la furor–libro de la Kongreso, ĉar ĝi rekorde vendiĝis ĉe la libroservo de UEA. La speciala ekzemplero numero 1 estis objekto de la tradicia kongresa aŭkcio kaj atingis la plej altan sumon, preskaŭ 300 eŭrojn. La gajno estos destinita por la Esperanto–Movado en Afriko.

### *Ĉu „La Zamenhof–strato” estis eldonita de la sama eldonejo, kiu aperigis „Ulica Zamenhofs”?*

Ne, la Esperantan version de la libro aperigis Eldonejo „Varpas” en Kaunas. La pola eldonisto ne garantiis eldoni la libron por la Kongreso en Svedio. D-ro Zaleski–Zamenhof, la heroo de mia libro, insistis, ke ĝi estu lanĉita en Gotenburgo, ĉar de tie li ricevis dum la milito signojn de homa solidareco. Mi faris riskan manovron, proponante

al la prezidanto de Litova Esperanto-Asocio, Paŭlo Jegorovas, helpi la eldonon de la libro en Litovio.

### ***En kio konsistis la risko?***

En la tempo-manko. La litovoj havis nur du semajnojn por eldoni „La Zamenhof-straton”. Ili agis brave kaj kuraĝe, rezulte meritplene povis kunĝui la sukceson dum la Gotenburga Kongreso. Kompreneble, libro eldonita en tiom mallonga tempo ne povas esti libera de preseraroj. Mi mem, legante ĝin jam finpresita, trovis iom da eraroj. Bedaŭrinde, dum la preparlaboroj aldoniĝis kelkaj lingvaj eraroj, kiuj tute ne ekzistis en la manuskripto. Tamen mi deziras forte emfazi, ke temas pri preseraretoj, kiuj neniel kripligas aŭ malkomprengigas la enhavon. Klare, ne mankas fanatikuloj, kiuj pro etaj korektendaĵoj senvalorigas la tuton. Tio estas la prezo de risko. Ĝenerale „La Zamenhof-strato” estis entuziasme akceptita kiel libro, kiu malkaŝas tute nekonatajn faktojn pri la Zamenhofa familio, prezentas ekstraordinaran personecon de d-ro Zaleski-Zamenhof kaj skizas interesan panoramon de Esperanto kaj ĝia historio.

### ***Vi menciis iam, ke la libro estos tradukita en la litovan lingvon?***

La litova traduko estas jam grandparte preta. La libro estas samtempe tradukata en la portugalan lingvon. Ĝus mi ricevis la peton el Zagrebo permesi eldoni la libron en la kroata lingvo.

Libroservo de UEA vendis ĝin en Gotenburgo po 18 eŭrojn kaj specialajn numeritajn ekzemplerojn po 30 eŭrojn. Mi aŭdis, ke la litova eldonisto fiksis specialan prezon por la Orienta Eŭropo, proksimume 30 zlotojn. Ne pensu, ke temas pri mia gajno; same mi, kiel d-ro Zaleski-Zamenhof, ni ambaŭ rezignis pri honorario.

***Dankon pro la interparolo.***

K.L.



## **Omaĝe al Lidja Zamenhof**

Okaze de la 100a naskiĝdatreveno de Lidja Zamenhof, Zofia kaj Jerzy Fornalowie lanĉis kadre de sia E-teatro „Espero”, vesperojn omaĝe al ŝi.

La 1an de decembro 2003 dum la kutima teatra renkontiĝo Zofia aŭdigis prelegon: „Lidja Zamenhof, vivo kaj agado”, kaj Jerzy, por omaĝi karmemoraran Lidja, prezentis la spektaklon: „Sopiro-Laboro-Espero”, konsistanta el poemoj kaj eldiroj de ŝia amata patro d-ro Ludoviko Zamenhof.

La 5an de januaro 2004 ambaŭ prezentis programon de Fervojista E-kulbo en Kopenhago. Tie Zofia prelegis pri la sama temo, vastigante ĝin per ŝiaj lastjaraj esploroj por la pretigata libro „Verkaro de Lidja Zamenhof”, kiun ŝi kunaŭtoras. La libro baldaŭ aperos. En ĝi unuafoje estos prezentita ŝia publicista verkaro, leteroj kaj kelkaj signifaj dokumentoj de Lidja kaj pri Lidja. Ĝi certe estos inda omaĝo al tiu plendediĉa, eminenta E-aktivulino, ⇨

## Nomumo de la nova Ĝenerala Direktoro de UEA

La 22an de decembro, la estraro de UEA nomumis Ĝenerala Direktoro sinjoron Osmo Buller. Al multaj legantoj la nomo estas konata. Temas pri la homo, kiu ĝis 2002 estis la Ĝenerala Direktoro de UEA.

Osmo Buller, kiu antaŭ du jaroj preferis alian laborlokon, nun estis inter la kandidatoj por la posteno de Ĝenerala Direktoro. Li daŭre sentas sin kun-respondeca pri la bonfarto de la Esperanto-movado kaj tute aparte de Universala Esperanto-Asocio. Cetere li agnoskas, ke kun la nuna estraro ja li povas kunlabori.

Neniam estis veraj malkonsentoj pri la ĝenerala linio de la Asocio, kaj



⇒ plurtalenta agantino kaj verkistino.

Dum tiu ĉi vespero Jerzy prezentis sian novan programon: „La Pereintoj in Memoriam”. Ĝi konsistas el poemoj de Wisława Szymborska, Jerzy Ficowski kaj Lodewijk Cornelis Deij. La poemoj estis interplektitaj per koncerna al la temaro muziko. La programo estis kortuŝe akceptita de kelkdeko da partoprenantoj. En la 1a n-ro de „Dana Fervojoj” aperis konciza raporto.

Ĉi-jare Zofia kaj Jerzy prezentos omaĝan al Lidja Zamenhof programon en diversaj lokoj, ankaŭ eksterlande.

Ĉiuj koncernatoj fakte harmonie kunlaboris pri la preparado kaj efektivigo de la antaŭa Kampanjo 2000 kaj de la nuna laborplano. Kaj la estraro kaj la nova Ĝenerala Direktoro agnoskas, ke la pasinteco estas konsiderinde fermita kaj la situacio de ĝenerala interkonsento en UEA povas esti konsiderata reakirita.

Kandidatiĝis por la funkcio de Ĝenerala Direktoro kelkaj personoj kaj estis kontaktoj kun potencialaj kandidatoj kaj el okcidenteŭropaj landoj kaj el landoj ekster Eŭropo. La estraro ekzamenis la kvalifikaĵojn de ĉiuj kandidatoj kaj ankaŭ la personan situacion, tute aparte en la kazoj de bezonataj labor-permesoj en Nederlando.

La estraro agnoskas ke Osmo Buller havas plurjaran sperton pri la proceduroj de la Centra Oficejo. Kvantam en la lastaj du jaroj la procedo de modernigo de kelkaj fakoj en la oficejo kaj en la funkciado de la estraro mem kuntrenis modifojn kaj pliajn aŭtomatigojn, la novelektita Ĝenerala Direktoro povos facile daŭrigi tiun procedon.

La estraro fidus la promeson de Osmo Buller plene sin dediĉi al harmonia organiza laboro kaj al senkondiĉa antaŭenigo de UEA kaj la Esperanto-movado.

Por la estraro:

**La estrarano pri financo  
kaj administrado  
Ans Bakker ten-Hagen**

**La prezidanto  
Renato Corsetti**

Czesław Baranowski

## PRĀKTIKA UZADO DE LA PREPOZICIO „JE”

Ni bone scias, ke ĉiuj prepozicioj en la lingvo internacia havas firman senco, ke la uzado de ili estas logika kaj regula, ke oni ne povas uzi ilin en alia senco ol ili havas origine. Okazas tamen, ke la senco de frazo ne montras klare, kiun prepozicion oni devas elekti, aŭ neniu el la konataj prepozicioj taŭgas por tiu celo.

La Kreinto de Esperanto solvis tiun ĉi problemon per enkonduko de la komuna prepozicio **je**, kies senco estas nedifinita kaj kiun oni povas uzi en ĉiuj dubaj okazoj. En la unua eldono de „Esperanta Krestomatio” Ludoviko Zamenhof skribis: „Se ni bezonas uzi prepozicion kaj la senco ne montras al ni kian prepozicion uzi, tiam ni povas uzi la komunan prepozicion **je**. Sed estas bone uzadi la vorton **je** kiel eble plej malofte”.

Skribante tiujn ĉi vortojn L. Zamenhof aldonis poste, ke anstataŭ la prepozicio **je** oni povas uzi ankaŭ aliajn prepoziciojn aŭ akuzativon sen prepozicio.

**Ekz.:** Mi ridas **je** lia naiveco (aŭ: mi ridas **pro** lia naiveco, aŭ: mi ridas **lian**

naivecon).

**Je** la lasta fojo mi vidis lin ĉe vi (aŭ: la lastan **fojon** mi vidis lin ĉe vi).

Mi sopiras **je** mia perdita feliĉo (aŭ: mi sopiras **mian** perditan feliĉon).

Ŝi soifas **je** miaj kisoj (aŭ: ŝi soifas **pri** miaj kisoj). Ĉiu homo havas rajton disponi **je** sia propra persono (aŭ: **pri** sia propra persono).

Konsiderante la sugeston de sia majstro, esperantistoj en la lasta tempo evitas la prepozicion **je** anstataŭante ĝin (se eblas) per aliaj prepozicioj.

### La prepozicio „je” estas tamen plu aplikata en la sekvantaj okazoj:

1. Antaŭ *mezur*-adjekto, *kiam* la *mezursuplemento* estas plurvorta.

**Ekz.:** Mia edzino estas pli malpeza ol mi **je** 10 kilogramoj, sed mi estas **je** duono de kapo pli alta ol ŝi. Ŝia frato estas **je** unu jaro pli juna ol mi. Ni estis malproksimaj unu de la alia **je** vojaĝo de unu tago (aŭ: malproksimaj **je** unu-taga vojaĝo). Li devis retiriĝi **je** kelke da kilometroj, por trovi la ĝustan vojon al mia domo. Mielno distancas **je** 10 kilometroj de Koszalin. Mi estis di-



stanca de ŝi **je** du paŝoj, do **je** la unua fojo mi vidis larmojn en ŝiaj okuloj. Ĉi–nokte la frostoj kreskis **je** naŭ gradoj.

2. *Post adjektivoj signifantaj abundon aŭ senigon: abunda, graveda, plena, riĉa, sata, kripla, dezerta, libera, nuda, senigita ktp.*

**Ekz.:** Okcidenta Pomeranio estas abunda (abundas) **je** riveroj kaj lagoj. Super ni etendiĝas senlima spaco graveda **je** astroj. Glaso da vino estas glaso plena **je** vino. (Z) Multaj homoj estas riĉaj **je** scio kaj sperto. La Nova Jaro 2004 estas riĉa **je** esperoj kaj promesoj. Miaj okuloj ne povis satiĝi **je** la vidaĵo de Vatikano. Pro akcidento li estas kripla **je** dekstra kruro. Kiom valoras homo kun la animo dezerta **je** amo? Tiu ĉi varo estas libera **je** doganpagoj. Antaŭ ni videblis muroj nudaj **je** ĉia pentraĵo. Por aŭskulti ŝin, li seniĝis **je** sia kolero. Dum sunbruniĝado naturistoj seniĝas **je** ĉiuj vestoj. Malliberuloj estas ofte senigitaj **je** ĉiuj rajtoj.

3. *Post kelkaj adjektivoj, kies rilato al la suplementa substantivo estas malfacile difinebla.*

**Ekz.:** Nia renkontiĝo estas inda **je** detala priskribo. Li estas inda **je** puno kaj malinda **je** rekompenco. Ŝi estas kapabla **je** ĉio. Li estas lama **je** unu piedo kaj malsanas **je** la stomako. Lia patro malsaniĝis **je** la okuloj. Multaj homoj estas malsanaj (malsanas) vintraj **je** gripo. Mi trinkas **je** via sano. Ne ĉiu belulino estas feliĉa **je** amo. Li estas surda **je** unu orelo. Gejunuloj ofte suferas **je** manko de singardo. Mia avi-

no suferas **je** absoluta manko de memorkapablo.

4. *Antaŭ adjekto de horo.*

**Ekz.:** **Je** kioma horo vi ellitiĝas? Mi ellitiĝas **je** la sepa matene. Venu al mi **je** la kvara posttagmeze aŭ **je** la oka vespere.

5. *Antaŭ la objekta komplemento de verb–subst., por eviti konfuzon kun la agantsignifa „de”.*

**Ekz.:** Rajto (de iu **je** io), aspiro (de iu **je** io), kalkulo (de iu **je** io, pri io), soifado, sufero (de iu **je** io), ĉaso (de iu **je** io), nostalgio (de iu **je** io, pri io).

6. *Antaŭ la adjekto esprimanta la tenatan korpoparton.*

**Ekz.:** Mi prenis ŝin **je** la mano (= **je** ŝia mano). Sed: Mi prenis ŝin **per** la mano (**per** mia mano). Li eksentis, ke oni tenis lin **je** la brako. Ŝi ofte kondukas lin **je** la nazo. Li falis, sed ekkaptis min per la manoj **je** la piedo.

**Analoge oni povas skribi:** Mi ekfrapis per la fingroj **je** la pordo. Li ekfrotis la alumeton **je** la alumetskatolo. Komencanta naĝanto tenas sin ofte **je** naĝtabulo.

7. *Antaŭ diversaj objektoj aŭ adjektoj, malfacile klaseblaj.*

**Ekz.:** Mi kredas **je** (pri) iu aŭ io (mi kredas ies ekziston); sed: Mi kredas al iu ion (mi rigardas vera tion, kion iu diras); Mi kredas al iu (mi rigardas iun verdirema).

Ankoraŭ kelkaj ekzemploj enhavantaj la prepozicion **je**:

◦ Mi kredas **je** Dio. Kristanoj profunde kredas **je** la senmorteco de la animo.

◦ Malmultaj homoj kredas **je** la fantomoj. Li eksedziĝis **je** sia edzino, kvankam ŝi gravediĝis jam **je** ĝemeloj. Eksedziĝante li ne prenis ĉion **je** la kalkulo.

◦ Por iome ripozi, la pozon sidan mi ofte ŝanĝas **je** la pozo duonkuŝa.

◦ **Je** kredito oni povas aĉeti nun preskaŭ ĉion. Mi asekuris la domon **je** alta monsumo. **Je** mia ĝojo (miro, surprizo) li plenumis sian promeson.

◦ La pastro baptis lian filon **je** la nomo Ludoviko. Mi sopiras **je** (pri, al) mia patrujo. Ŝia zorgoplena vizaĝo heliĝis **je** lia vido. Mi kalkulas **je** vi (**je** via amika helpo). Mi veturis kun rapideco 50 kilometroj **je** horo (aŭ: en, por horo).

◦ La prezo de la manĝo estas ekskluziva **je** la vino (aŭ: ekskluzivas la vinon).

◦ Homoj ofte vetas **je** grandaj monsumoj, sed mi vetas kun vi nur je 10 zlotoj.

### Rimarkoj:

◦ Laŭ PAG oni ankaŭ uzas **je** ĉe festotagoj: **je** Pasko, Kristnasko, Pentekosto.

**Ekz.:** Mi ne povis veni al vi **je** Kristnasko, do mi certe venos **je** Pasko.

◦ Per la prepozicio **je** oni povas analizi kunmetitajn vortojn.

**Ekz.:** herboriĉa — riĉa **je** herbo, varmplena — plena **je** varmo, prespreta — preta **je** preso, servopreta — preta **je** servo, pekliberigi — liberigi **je** la pekoj.

◦ La prepozicio **je** neniam estas uz-

ata memstare, ĝi ne plenumas ankaŭ funkcion de prefikso.

◦ Post la prepozicio **je** oni neniam uzas akuzativon.

Finante, mi aldonas kelkajn proverbojn el la *Proverbaro Esperanta* de nia majstro Ludoviko Zamenhof:

◦ Peko kaj eraro estas ecoj de l' homaro. Ĉiu komenco estas malfacila.

◦ Homo lernas la tutan vivon. Nur tiu ne eraras, kiu neniam ion faras.

◦ Juneco ne scias, maljuneco ne povas. Nin ĉiam ravas, kion ni ne havas.

◦ Ne vivu kiel vi volas, vivu kiel vi povas. Pli bona estas io, ol nenio.

◦ Kun kiu vi festas, tia vi estas. Kritiki estas facile, fari malfacile. ♡

- • • • •
- **Ĝustigoj kaj korektoj**
- 
- *En la lasta numero de PE oni povis trovi kelkajn erarojn, pro kiuj mi pardonpetas kaj la legantojn, kaj la aŭtorojn. Bonvolu korekti:*
- 1. *En la artikolo „Morgaŭ signifas Hodiaŭ” (paĝo 174) la lasta frazo devas esti: „Kaj pri tio, ĉu la espero renaskiĝas, ĉu ne” (kaj sen demandosigno).*
- 2. *En „Lingva anguleto” (paĝo 180) la titolo devas esti: „Praktika uzado de la prepozicio PRO”.*
- 3. *En „Mondo, lingvo kaj vortaro” (paĝo 182, 2a kolumno, verso 18) forstreu la vorton „oni”. La frazo devas esti: „Similajn diferencojn eblas trovi multe”.*
- *Pri minuskla kaj majuskla skribmaniero de vorto „Esperanta” mi dediĉas la apudan tekston.*
- • • • •

## Ortografio kaj Esperanto

Dum mia redakcia laboro mi frontis la problemon, esprimitan de du kunlaborantoj, rilatanta al skribmaniero de vortoj *Esperanto* kaj *Esperanta*. Ili ambaŭ riproĉis min pro neĝusta — laŭ ili — majuskligo de ambaŭ vortoj.

Laŭ la difino de nova PIV\*, ortografio signifas: „Maniero laŭnorme skribi la vortojn de difinita lingvo: fonetika, etimologia ~o; la ~o en la plimulto de la lingvoj [...] prezentas veran krucon por la lernanto<sup>2</sup>; akceptante nur la internacian (E-an) ~on<sup>2</sup>.”

En tiu sama fonto oni povas trovi du sinsekvajn radikojn (p. 298): la unua „esper/i”, skribita minuskle, kaj la dua „Eesperant/o” — majuskle.

1. Inter multaj derivaĵoj de la „esper~” oni povas trovi la signifon: „esper/anto” = homo, kiu esperas, kun Zamenhofs ekzemplo: *per laboro de la esperantoj*.

2. La dua radiko „Esperant~” havas du sencojn: „1 Ps. de L.L. Zamenhof okaze de publikigo de la unua libro de lia lingvoprojekto. 2 (ankaŭ min.) Lingvo sengenta, iniciatita de Z.” (...)

Bonvolu noti, ke en la dua signifo oni *permesas* skribi la nomon de la lingvo internacia ankaŭ minuskle (apud la kerna regulo — majuskle.

Serĉante aliajn fontojn pri ortogra-

fio de Esperanto, mi konsultis la *Ple-nan Manlibron de Esperanta Gramatiko*\*\* . En la ĉapitro „Majuskloj kaj minuskloj” mi trovis jenan difinon: *Ne ekzistas devigaj reguloj pri la uzo de majuskloj kaj minuskloj. Legu tamen pri la uzo de majuskloj ĉe propraj nomoj. Do, mi legis: Oni skribas ĉiujn proprajn nomojn kun komenca majusklo: Elizabeto, Parizo, Hindujo, Nov-Zelando, Esperanto. Tio estas ĝenerala regulo, kiun sekvas pli-malpli ĉiuj.*

Kaj tuj poste: *Se oni faras el propra nomo alian vorton, kiu mem ne estas propra nomo, oni normale konservas la majusklon (ĉar la propranoma parto de la vorto restas propra nomo), sed oni ankaŭ povas minuskligi (ĉar la tuto ne plu estas propra nomo). La kutimoj estas tre diversaj. Kaj sube la ekzemploj: Esperanta, Esperantisto (kun rimarko, ke la minuskla skribo de *esperantisto* estas pli ofta).*

Por ni, poloj, al kutimiĝintaj skribi (en la pola) adjektivojn minuskle (*polski, esperancki*), la formo *esperanta* nature ŝajnas esti pli ĝusta. Tamen pli racia kaj apogita je Zamenhofs skribmaniero, estas la formo *Esperanta*, se rilatas al la (propra) nomo de nia plej ŝatata lingvo, kaj ne al iu, kiu havas esperon. Kompreneble, tute ne temas

pri sklaveca imitado de Zamenhof, kontraŭa al disvolviĝo de la lingvo, sed pri klareco de niaj esprimoj en ĉiuj dubindaj situacioj. Ni memoru, ke en la plej gravaj mondlingvoj oni skribas lingvo-nomojn majuskle, kio estas pli logika kaj praktika, simile kiel gento-nomojn (Polo, Germano, Judo) — la kutimo pli kaj pli ofte uzata ankaŭ en la internacia lingvo.

Tiu „nova reformo” skribi *esperanto*, *esperanta* minuskle kondukas al la pinta absurdo. De tempo al tempo mi trovas mallongigojn: *e-libro*, kiu estas internacie konata kiel „elektronika libro” kaj tute ne „Esperanta libro”, kiel intencis la skribinto. Simile *e-poŝto* signifas „elektronika poŝto” (= ret-mesaĝo), kaj *e-komunumo* estas aro da Interret-uzantoj („elektronika komunumo”), kaj neniam „Esperanto-komunumo”.

Je mia granda ĝojo bonaj aŭtoroj kaj redaktoroj de lernolibroj, E-revuoj kaj vortaroj zorgeme korektas ricevitaĵojn, por ke nia lingvaĵo ne estu ambigua. Tion ankaŭ mi provas fari, ne ĉiam kun akcepto de la aŭtoroj, *esperante*, ke niaj *Esperantaj* tekstoj servu por niaj legantoj ankaŭ kiel ekzemplo de klara ortografio. 📖

\* *La Nova Plena Ilustrita Vortaro de Esperanto*, 2002, SAT, 67 avenue Gambetta FR-75020 PARIS.

\*\* *Plena Manlibro de Esperanta Gramatiko*, Bertilo Wennergren, e-versio 12.01.; [www.bertilow.com/pmeg/](http://www.bertilow.com/pmeg/).

## ESPERANTA VIKIPEDIO NUN ENTENAS 10 000 ARTIKOLOJN

La esperantlingva fako de la multlingva kunlabore rete verkata enciklopedio ‘Vikipedio’ atingas dek mil artikolojn, ĉiutage verkatajn de kunlaborantoj el pli ol 30 landoj.

Vikipedio estas multlingva projekto kun pli ol 300 000 artikoloj en pli ol 40 lingvoj. Artikoloj samtemaj en diversaj lingvoj estas simple interligitaj tiel, ke leganto povas facile transiri de unu lingvo al alia, kaj de unu temo al alia. Estas unika ŝanco por Esperanto esti agnoskita kiel monda kleriga kulturlingvo.

Ankaŭ vi povas ekkunlabori en tiu senprecedenca projekto.

<http://eo.wikipedia.org>



## FONETIKA EKSPERIMENTO EN ESPERANTO

Internacia eksperimento, kiu celas priskribi kaj taksu la prononcon en Esperanto, estas grava parto de verkata disertacio pri la norma prononco de nia lingvo internacia, fare de Oksana Burkino, postdiploma studentino ĉe Sankt-Peterburga Ŝtata Universitato (katedro pri ĝenerala lingvistiko). Ŝi petas, ke ĉiuj, kiuj ekdeziras partopreni, dediĉu iom da minutoj por tiu ĉi serioza esploro.

<http://sfo.ab.ru/~oxy/>

Fonto: TEJO-AKTUALE

István Ertl, Zbigniew Galor

## KREPUSKO DE PARADIGMO

Ni ĝojas\* ke nia modesta proklamo jam komencas vekti reagojn kaj diskuton. Tio estis nia celo. Ajna pliklarigo de la ideoj ĉirkaŭ la esperantista identeco povas nur utili al nia komunumo. Tial ni dankas pro la komentoj de Ljubomir Trifonĉovski kaj Bertil Nilsson\*\*.

S–ano Trifonĉovski bazas sian respondon sur tiu dikotomio „finvenkisto–raŭmisto” kies legitimecon ni pridubas. Lia reago atestas, ke kompreni problemon pri la paradigmo malhelpas tiu ĉi paradigmo mem. Li, ŝajnas, erare komprenis nian elpaŝon kiel atakon

de „finvenkistoj” kontraŭ „raŭmistoj”. Dume ni klopodas ĝuste komprenigi, ke ambaŭ duonoj de tiu koncepta paro estas eksigindaj kaj ke ilia klariĝa povo pri la socia konsisto de esperantistoj estas tre limigita. Tiun limigitan klarigpovon kaŭzas la karaktero nescienca, ja plie ideologia, t.e. dogme valoriga de la skemo. Ĝuste tial ni uzis la vorton „paradigmo” — ja Esperantujo bezonus liberigi sin de ĉi tiu katena paradigmo **por paŝi pluen**.

La bezono liberigi je la eksa paradigmo tamen neniel signifas ke la esperanta movado bezonus liberigi ⇨

\* Nia ĝojo pro la reago estus plena, se akompanus ĝin prezento de nia proklamo libera de cenzora manipulado, tia kiu ne erarigus legantojn de HdK: 1) el la proklamo oni forprenis kaj la titolon (*Proklamo pri elĉerpiĝo de la paradigmo finvenkismo–raŭmismo*) kaj la unuan frazon: (*Ni, sube subskribintaj partoprenantoj de la XIX–a ARKONES en Poznań*); 2) oni deformis ankaŭ liston de subskribintoj, skribante: «ses esperantistoj loĝantaj en Pollando plus Detlev Blanke kaj István Ertl (neniu el ili estas Esperanta civitano) subskribis la suban „proklamon”», origine: Detlev Blanke, Tadeusz Chrobak, István Ertl, Zbigniew Galor, Georgo Handzlik, Paweł Janowczyk, Zbigniew Kornicki, Ilona Koutny; 3) oni entute prisilentis apartenantan al la proklamo informon: PROKLAMO DE POZNAŬO. Proklamon pri elĉerpiĝo de la paradigmo finvenkismo–raŭmismo kunverkis István Ertl kaj Zbigniew Galor, kiu ankaŭ prezentis ĝin enkadre de la XIX ARKONES\* — 27.09.2003. — en Poznań (Pollando) dum primovada panel–diskuto, kiun gvidis Tadeusz Chrobak. Ni ĝin aperigas por pripensigi la legantojn. Se vi opinias same, bonvolu sendi mesaĝon kun vorto Jes! kaj via nomo al adreso: zgalor@au.poznan.pl.

\*\* „Heroldo Komunikas” n–ro 212, 2003–10–29.

## Aŭtomata miskompreno

Onidire averaĝa usonano kredas, ke en la tuta mondo oni parolas angle. Kiel plimulto da onidiroj ankaŭ tiu ĉi evidentiĝis falsa. Jen interesa kazo de Sinjorino Sally Hogan el Warsaw, Indiana. Ŝi volis ricevi de mi kelkajn informojn kaj tiucele skribis al mi leteron ne en la angla, sed en la pola

lingvo. Mi citas ĝian fragmenton:

*Ja czynić spodziewać się ty cieszył się twój wizyta wobec Warszawa Indyjski i Ja znać społeczeństwo wola miłość skoro twój produkcja TV. Czy jest wszelki zaryzykować ów pewien kopiować od ten program kulisy być wy-* ⇨



⇨ sin de la strukturoj kiuj sin mem etikedas ĉu „raŭmismaj” ĉu „finvenkismaj” (kvankam, ĉi lastaj maloftas, kio ŝajnas pravi ke „finvenkista” estas plie ideologie etikedo ol realaĵo).

Nomoj „finvenkisto” kaj „raŭmisto” estas **duagradaj**: devenas de primara, fundamenta fenomeno — esti esperantisto aŭ/kaj esperant(i)ano. Por ni, esperantisteco reduktiĝas nek al „finvenkisteco” nek al „raŭmisteco”; ĝi fontas el historio de esperanta ideo, devenas de nia propra libervola decido paroli esperante kaj esprimiĝas en uzado de esperanto: kiel komunilo, sinesprimilo, krome en popularigado de esperanto inter neesperantistoj. Ĉiuj esperantistoj estas anoj de lingvokomunumo kaj **nur** baze de tio

ili apartenas al diversaj esperantaj organizoj kaj komunumoj elektitaj far ili mem. Tia esperantisteco ne enhavas batalon kontraŭ aliaj esperantistoj — nur batalon por popularigi esperanton. Tia esperantisteco ne bezonas imiti ŝtaton — kio signifas forjeton de nia identeco. Al ĝia tradicio konvenas konduto de gastiganto kiu bonvenigas gaston enkadre de komunaj e-kulturaj valoroj kun principo de reciprokeco. Fantomo de zorganta pri sia potenco, burokrata „pasport-donanto” ludas tie rolon el alia spektaklo. Kaj ne gravas ĉu akompanas ĝin „kulturflegema” ĉu „finvenkema” fono. ♡

[red] Mi konservis la originalan ortografion.

*ŝtal do Kościuszko Hrabstwo. My był-  
by miłość wobec zobaczyć ono. On był  
cudowny zebranie ty i Ja życzyć ty du-  
żo powodzenie.*

*Szczerze Wypad Hogan.*

La pollingva letero de Sally, kvan-  
kam ĝi estas preskaŭ nekomprenebla,  
vere kortuŝis min. Kiom da peno faris  
la usona varsoviaŭino por kompreni-  
gi sin! Oni povas konjekti, ke ŝi havigis  
al si anglan-polan vortaron kaj tradu-  
kis vorton post vorto. Ĉu vi rimarkis,  
ke ŝi kopiis la vortojn senerare, zor-  
gante ankaŭ pri supersignoj? Eĉ tiel  
terura vorto kiel „*szczerze*” estas ko-  
rekte reskribita. Ŝi poligis ankaŭ sian  
antaŭnomon. El pluraj signifoj de la  
angla vorto „*sally*”, ŝi elektis „*wypad*”,  
kio en la pola lingvo signifas: „*eskapo*  
el la sieĝita fortikaĵo”.

Ludoviko Zamenhof en sia *Unua  
Libro* provis pruvi, ke Esperanto estas  
unusola lingvo, kiun oni povas kom-  
preni nur helpe de vortaro. Male oka-  
zas kun aliaj lingvoj. Li citis german-  
lingvan frazon: *Mi ne scias, kie mi lasis  
mian bastonon*. Por traduki tiun ĉi fra-  
zon en la polan, helpante sin per ger-  
mana-pola vortaro, oni ricevas sen-  
sencaĵon: *Ja biały nie gdzie ja piętro  
spokojny majątek mieć ona*. Simile agis  
„Sinjorino Wypad”.

Eble Vi volas scii, kiel mi fariĝis  
pollingva korespondanto de la usona-  
nino. Dum la jaro 2003 mi pasigis tri  
monatojn en Usono kaj vojaĝis milojn  
kaj milojn da mejloj tra tiu fascina,  
potenca kaj libera lando. Nu, realtive

libera, ĉar foje mi havis la impreson,  
ke mi devojiĝis al... Sovetunio. Timo  
pro terorismo rezultigas tie diversajn  
limigojn de la persona libereco. Mi fa-  
ris ses dokumentajn filmojn por la Po-  
la Televido. Unu el ili, titolita „*Warsza-  
wa bis*”, rakontas pri tute alia Usono  
ol oni kutime imagas ĝin. La filmo te-  
mas pri la malgranda, provinca urbo  
Warsaw en la ŝtato Indiana. La usona  
Varsovio estas ĉefurbo de la graflando  
(pole „*powiat*”) Kościuszko. Kial Var-  
sovio, kial Kościuszko? Por la respon-  
do mi bezonus kelkajn paĝojn de „*PE*”.  
Eble Vi ekscios pri la afero televide.

Tamen mi devas klarigi, kiu estas  
Sally Hogan. Ŝi estras la lokan muze-  
on. Mi intervjuis ŝin pri historio de la  
urbo. Akompanis min mia nevo An-  
drzej Dobrzyński, kiu bonege inter-  
pretis. Ĉar mi uzis nur la polan, ne es-  
tas mirinde, ke sinjorino Sally skribis  
al mi sian leteron pollingve.

Dum verkado de tiu ĉi artikolo mi  
ankoraŭfoje trastudis la leteron. En-  
pensigis min jena frazo: *Ja ufundować  
pewien pajęczyny ów tłumaczy z Język  
angielski wobec Polski. Ja jestem zamie-  
rzać próbować ten*. La vorto „*pajęczyna*  
— *araneajo*” supozigas, ke sinjorino  
Sally trovis en la Interreto aŭtomatan  
tradukprogramon el la angla en la po-  
lan. Efektive tiel okazis.

Surbaze de la aŭtomata letero oni  
povas konkludi simple:

Vivu Esperanto!



## STUDIO „P” ...

### EN BERLINO

Okaze de la Jubilea Festo „100 jaroj de Esperanto en Berlin”, aranĝita de Esperanto-Ligo en Berlin kaj Brandenburgia Esperanto-Asocio la 21–23an de novembro 2003, la pola Junulara Teatro STUDIO „P” el Toruń estis invitita al Berlino por kontribui la artan programon de la Jubileo. La teatro kreis tiuokaze novan programon (havante por tio nur iom pli ol 3 monatojn), titolita „Ĉiu havas sian monton”.

La berlinaj esperantistoj jam tradicie diversforme kunlaboras kun la aganta en Berlino Pola Instituto. Ankaŭ ĉifoje la esperantista aranĝo okazis en la sidejo de la Instituto, kiu ĉeokaze invitis Studion „P” prezenti tiun ĉi programon en la pola lingvo, por poloj loĝantaj en Berlino, kiuj ĝuste kunvenis en la Instituto okaze de la Festo de Sendependeco.

Tiamaniere la unuan fojon en la historio de la Teatro premieroj en Esperanto kaj en la pola lingvo okazis tagon post tago eksterlande.

La ambaŭ prezentoj sukcesis tre bone. Post la spektakloj okazis interesa

diskutado kun publiko.

La junaj geaktoroj estis impesitaj precipe de la esperantista publiko, kiu multnombre partoprenis la diskuton. Ŝajnis, ke la ambaŭ flankoj de la diskutado estis surprizitaj — la esperantistoj pro la alta nivelo de la prezentita spektaklo kaj la junularo pro la vera interesiĝo de la spektantoj.

La diskutantoj laŭdis la modernan formon de la teatraĵo, bonan aktoradon de gejunuloj kaj ilian bonan, klaran prononcadon de Esperanto. Plaĉis ankaŭ la enhavo de la prezentita programo, respegulanta problemojn de la juna poeto, kiu serĉas sian lokon en la ĉirkaŭanta mondo, kaj la esperigaj kantvortoj, kiuj finas la spektaklon:

*Se iu grimpis pintojn  
kaj nubojn tuŝis per frunt’  
Por ĉiam jam sopiros  
al nubskrapanta mont...*

La publiko volonte kaj entuziasme kunkantis la refrenon de la lasta kanto:

*Ne, ne diru, ke ni havas  
nenion veran,  
Estas, kiel antaŭe,  
infero kaj ĉielo.*

Resumante la vojaĝon kun la gvi-



dantino kaj reĝisorino de la Teatro — Lucyna Sowińska, kun ĝojo ni konstatis, ke meritis pene labori preparante la novan spektaklon por la berlinaj okazintaĵoj. La esperantista jubilea festo kaj la pola nacia festo en Berlino estis sukcese pliriĉigitaj de la pola junulara teatro, prezentanta la zorgojn kaj revojn de junularo en la nuntempa mondo pere de poeziaĵoj de polaj poetoj. Gravaj estas ankaŭ edukvaloroj de la okazintaĵo. La junaj geaktoroj spertis, kiom valora estas Esperanto, kiom interesaj kaj amikecaj estas esperantistoj. Ili povis ankaŭ renkontiĝi kun la poldevenaj gejunuloj, loĝantaj nun en Berlino kaj interŝanĝi siajn spertojn.

Denove dank' al Esperanto Studio „P” povis plilarĝigi sian konon de la mondo — nun viziti la ĉefurbon de Germanio, ekkoni ĝiajn valorojn kaj ĝui belegajn, jam kristnaskfestajn ornamojn.

Mi tre ĝojas, ke mi havas okazon kunlabori kun la Teatro.

## EN TORUŬ

La festa premiero de la spektaklo okazos dimanĉe, la 29an de februaro 2004, je la 15a horo, en la Junulara Kulturdomo en Toruń, str. Przedzamcze 11.

Ni kore invitas ĉiujn esperantistojn! Por gastoj, kiuj volus (kaj povus) veni jam sabate, la 28an, torunaj esperantistoj proponas la akompanan programon:

— sabate vespere — literaturan ve-

speron en la kafejo „Oblikva Turo”,

— dimanĉe antaŭtagmeze — aŭdo-vidan spektaklon kun esperantlingva komento en la Nikolao Kopernik Muzeo,

— vizitadon de la urbocentro kaj la Etnografia Muzeo kun ĉiĉeronado en la internacia lingvo.

Eblas mendi dormolokojn: en 5-litaj ĉambroj je 20 zł po persone; 3-litaj ĉambroj — 35 zł.

Pro organizaj aferoj ni petas kiel eble plej fruajn anoncojn pri la partopreno.

Nome de torunaj esperantistoj

**Teresa Nemere**



## 16a Ekumena Esperanto-Kongreso en Rimini (2003)

La 16a Ekumena Esperanto-Kongreso okazis en Rimini (Italio) honore al la pastro Duilio Magnani, honora prezidanto de IKUE dum la tagoj 30a de aŭgŭsto ĝis la 6a de septembro 2003 jaro.

Pastro Duilio Magnani estas konata en esperantista mondo, precipe katolika esperantistaro pro lia poresperanta agado. Lia preĝejo estas preskaŭ Esperanta sanktejo. Tiel belege ornamitan pere de Esperantaj mozaikoj, Esperantaj surskriboj kaj insignoj preĝejoj tutcerte ni ne sukcesus trovi en la tuta mondo. Do la Kongreso en Rimini estis la kronado de lia Esperanta agado.

La historio de Rimini estas antikva,

kiel la historio de Romo. Ĉi tie fluas la riviero Rubikono, konata pro la fama transiro kaj eldiro de Julio Cezaro. En tiu ĉi regiono renkontiĝis Romia kaj Bizancia kulturoj. El tiu ĉi renkontiĝo estiĝis la imponaj mozaikoj en Ravenna, kiuj ĝis hodiaŭ influas la artajn laborojn de la regionaj artistoj. Tion ekzemple pruvas la interesaj Esperanto-mozaikoj de la Kongreseja preĝejo Johano kaj Paŭlo en Rimini.

La hodiaŭa Rimini fariĝis ĉefurbo de la monda kaj populara feriado pro la beleco de la marbordo, la klimata mildeco kaj ankaŭ la sincera afableco de ĝiaj loĝantoj. La nuntempa plej fama ido de Rimini estas reĝisoro Federico Fellini, kiu vivis en la jaroj 1920 — 1993, kies la monumento staras ĉe la enirejo de la urba tombejo.

La temo de Ekumena Kongreso estis: „Vi estas miaj atestantoj — salo kaj lumo por la mondo”.

La aranĝon partoprenis ĉirkau 280 personoj el diversaj landoj. Estis gesamideanoj de diversaj kristanaj konfesioj, do katolikoj, protestantoj, ortodoksanoj. El Pollando venis preskaŭ la plena aŭtoĉaro de gesamideanoj, inter ili du pastroj: pastro Stanislavo Płachta kaj pastro Stanislavo Płatek. Krome kelkaj personoj venis al Rimini per propraj aŭtomobiloj.

La programo de la Kongreso estis vere tre interesa kaj valora. Okazis multaj prelegoj. Ĉiutage estis celebritaj sanktaj Mesoj kaj aliaj diservoj. KELLI-anoj ankaŭ havis proprajn diservojn. Ankaŭ okazis komunaj preĝoj kaj kan-

toj. Ne mankis ankaŭ la artaj programoj kaj ekskursoj.

Kiel ĉiam kortsiĝis ĉiujn belaj kantoj de „Anjo Amika” el Hungario, kaj precipe *Ave Maria* en ŝia plenumo. Ne mankis polaj akcentoj. Jen Leszek Łęgowski el Bydgoszcz konata jam bone poeto, kiu eldonis multajn versaĵkolektojn prezentis siajn poemojn varme aplaŭdata, kaj Bogusław Sobol dum la gaja vespero prezentis epigramojn.

Se temas pri ekskursoj, ni vizitis San Marino kaj Ravenna, krome polaj gesamideanoj dum la vojaĝo al Rimini vizitis Padovon, kaj revenante el Rimini al Pollando haltiĝis en Venecio.

Kadre de Ekumena Kongreso en Rimini okazis la ĝenerala kunveno de IKUE, kiu elektis novajn gvidorganojn de la unuiĝo por periodo: 2003–2007. Estis elektita nova prezidanto de IKUE, kiu nun estas Miloslav Švaček el Ĉeĥio. Al la estraro estis elektitaj:

pastro Kobor el Hungario, pastro Magnani, s-ro De Salvo, s-ro Bošin, s-ro Sarandrea — ĉiuj el Italio, kaj s-ino Belošević el Kroatio, s-ro Skupas el Litovio, s-ro Sobol el Pollando.

Venontjare IKUE Kongreso okazos en Litovio, en urbo Kretinga.



## Oblata renkontiĝo en la Klubo de Katolika Intelektularo

La 10an de januaro 2004 en la Klubo de Katolika Intelektularo en Varso-

vio okazis ĉiujara „Oblato” de esperantistoj. La s-tan Meson celebris pastro Roman Forycki. Ĉar la diservon partoprenis ne nur esperantistoj, sed ankaŭ amikoj de Esperanto, gefamilianoj de esperantistoj kaj la simpatiantoj, la sankta Meso estis celebrita pollingve kaj certa parto, legaĵoj ktp. esperantlingve.

La partoprenantojn tre afable salutis kaj bonvenigis la longjara estro de la Esperanto-Sekcio ĉe la Klubo de Katolika Intelektularo s-ro Wiesław Tomaszewski.

Tre interese kaj bele predikis pastro Forycki, kiu antaŭ ĉio substrekis la amon al Dio kaj proksimuloj, al ĉiuj homoj. Dum la propetaĵoj oni preĝis intence al la Eklezio, la Papo, Esperanta Movado, mortintaj gesamideanoj, interkompreniĝo inter la popoloj, paco kaj aliaj.

Post la s-ta Meso okazis la arta programo, dum kiu la partoprenantoj de la aranĝo havis la eblecon aŭskulti belegajn kristnaskajn kantojn de diversaj popoloj en la bonega plenumo de solistino Krystyna Kostorżyńska. Poste okazis agrabla renkontiĝo ĉe la teo, kafeo, kuketoj kaj oni dividis oblatojn kaj bondeziris reciproke.

Dum la amika, frata etoso oni kantis diversajn polajn kristnaskajn kantojn (pole: kolędy), recitis religiajn poemojn kaj interparolis.

**Bogusław SOBOL**

## Neoficiala raporto el GRUPE-7 (08-11.XI 2003)

1. Ne estas vero, ke nomo „GRUPE” devenas de germana vorto „Gruppen-sex”; ĝi estas mallongigo de „Glivice’a Rendevuo de Uzantoj kaj Praktikantoj de Esperanto”.

2. La eldonanto de „Pola Esperantisto” provis aserti, ke ĉefa temo de renkontiĝo devus esti: „Reabonu, abonu kaj abonigu ‘Pola Esperantisto’-n”.

3. Milita temo dum GRUPE. Gasto el Hispanio prelegis pri diversaj bataloj. Ekzemple pri florbataloj, tomatobataloj, taŭrobataloj, kiuj okazadas en lia lando. Kaj li provis konvinki, ke postrestaĵo, kiu restas post tomatobataloj ne estas eksportata (kiel keĉupo) al la tuta Eŭropo.

4. La plej ŝatatan temon de prelego gvidis konata (en Esperantujo) reĝisoro kaj eksa estrarano de UEA. La plej ŝatata temo por preleganto estas ĉiam la sama. Li rakontis pri si mem.

5. Estas danĝere rakonti fabelojn („Montaraj legendoj”) dum vespera programo. Multaj miskomprenis ideon kaj komencis dormi jam dum prelego.

6. Multaj geesperantistoj frekventis GRUPE-on nur dum unu tago. Ĉu ĉi tio signifas, ke oni povas elteni dum GRUPE nur unu tagon?

7. Gasto el Hispanio alportis unu botolegon da bonega vino „Sangria”. Tamen, laŭ ĉiuj supozoj, unu botelo estis tro, tro malmulte...

8. Oni provis sanktigi la alkoholon. La nomon „Sangria” oni provis esper-

antigi al „Sankta Grio”. Neniu tamen konis ĉi ulon, Grio–n.

9. La plej ofte frekventata loko dum „GRUPE” estis bufedo, kie reĝis ege afabla kaj simpatia blondulino, sinjorino Kristina. La bufedo — bedaŭrinde estis prohibicia kaj absolute senalkohola.

10. Kelkaj, kiuj loĝis en la internulejo de fervojista teknikumo ege ĝojis pro la fakto, ke ili senprobleme interkomunikigas internacie. Ili ĝojis ĝis profunda punkto, ĝis tiam, kiam ili, probable, ĉesis interkompreniĝi (aŭ — laŭ aliaj vortoj — ili interkompreniĝis ĝisfunde).

11. Kvizprogramo, kiu daŭris tri tagojn po unu horo, plaĉis al multaj. Tamen por kelkaj ĝi estis kaŭzo de streĉo. Ili diris, ke kvankam konas Esperanton dekelkajn jarojn tamen ili ne scias pri kio temas en la kvizoj.

12. Kiam unu GRUPE–anino provis enlitiĝi, ŝi trovis tie viron. Post kelkvorta, arda interparolo evidentiĝis, ke ŝi maltrafis ĉambron. Tamen Andreo ne sukcesis uzi la ŝancon.

**Marian Zdankowski**

*En la jaro 2004 elektante servojn de ESPERANTOTUR Bydgoszcz (partopreno en UK-oj kaj aliaj vojaĝoj) kaj Studumo pri Turismo kaj Kulturo, vi povas sendi viajn aliĝilojn al la redakcio de Pola Esperantisto, kiu nun estas peranto de iliaj servoj.*

*Samtempe ĉiuj viaj pagoj al ESPERANTOTUR aŭ Internacia Studumo pri Turismo kaj Kulturo enhavu alskribon: „Pola Esperantisto”; tiamaniere vi subtenos finance la eldonadon de la revuo.*

*Antaŭdankon!*

## Brusela Komunikadcentro

Esperanto estas mirinda lingvo kaj fenomeno. Bedaŭrinde malmultaj scias pri tio... Do, indas informi al homoj! Sed kiel informi kaj per kio?

La Reta Informado–Centro (RIC) [www.ikso.net/ric](http://www.ikso.net/ric) helpas al vi respondi tiujn demandojn.

La celo de RIC estas subteni informantojn pri Esperanto, TEJO, UEA, E@I k.s. per konsiloj, pretaj informiloj, informileroj, faktoj kaj diskutoblecoj.

Per RIC eblas:

- a) elŭti informilojn en plej diversaj lingvoj kaj formatoj;
- b) preni informilerojn utilajn kiam oni volas krei sian propran informilon;
- c) legi konsilojn pri informado;
- d) preni „faktojn” por sia prelego aŭ simile.

Ankaŭ vi povas alŭti via(j)n informilo(j)n per la formularo ĉe:

[www.ikso.net/ric/sxutajxojj/alsxuti.php](http://www.ikso.net/ric/sxutajxojj/alsxuti.php)

por dividi ilin kun aliaj! Nur se multaj kontribuas per sia materialo, RIC havos grandan utilon.

Pri RIC kunlaboras pluraj personoj de diversaj organizoj, tamen ĉiuj kun la sama celo: „informi al la mondo pri Esperanto”.

Kunordigas la projekton la internacia laborgrupo Esperanto@Interreto — [www.ikso.net/echei](http://www.ikso.net/echei).

**Marko Naoki Lins**

## Zamenhofa Tago

La 12an de decembro 2003 en pola urbo Lodzo, en Liceo nome de L. Zamenhof, okazis Zamenhofa Tago. La festotagon okaze de sia patrono organizis XXXI Liceo kune kun PEA-filio en Lodzo. Elkore akceptis gastojn kaj partoprenantojn Direktorino de la mezlernejo Bożena Matuszczak.

Inter gastoj estis anoj de Ĉefa Estraro de PEA, redaktoro de *PE*, kaj lodzaj esperantistoj. Gelernantoj de la mezlernejo prezentis interesan porokazan programon.

Estis prezentadoj, teatraĵetoj, koncertoj. Tuta aro da gelernantoj partoprenis en reta konkurso pri Esperanto kaj Zamenhof. Okazis ankaŭ aliaj konkursoj en aŭ pri Esperanto. Gajnintoj ricevis premiojn.

Stanisław Mandrak — prezidanto de PEA — montris ebelcojn de lernado de la lingvo internacia helpe de komputilo. Kazimierz Leja substrekis ankaŭ „tradiciajn” metodojn lerni Esperanton, prezentante ĵus eldonitan lernolibron de 14-jara aŭtoro el Kutno, Maciej Zgondek.

Salonon ornamis bela porokaza tabulo kaj ankaŭ fotoĵoj de Andrzej Sochacki. Post la oficjala parto Irmina el Klubo „Varsovia Vento” forte kaj interese instigis al lernado de Esperanto.

La Zamenhofa Tago povis okazi dank’ al instruisto Jan Szałowski kun helpo de Lodza filio de PEA sub prezidanteco de Robert Kamiński.

**Andrzej Sochacki**

## Aŭtora vespero en Kutno

Post sukcesa eldono de la libro *Iĝu esperantisto! Samouczek języka esperanto* ĝia aŭtoro, 15-jara Maciej Zgondek estis intervjuita de loka gazeto kaj radio Lodzo. La gimnazio en Kutno, kie li loĝas kaj lernas, organizis la 12an de decembro tre simpatian aŭtoran vesperon ĉe kandeloj, kun partopreno de urbaj instancoj, ĵurnalistoj, instruistoj kaj kompreneble gekolegoj de Maciek.

Tiuj lastaj preparis artan literaturan kaj muzikan programon kaj amuzajn skeĉojn, ĉio en vere altnivela plenumo.

Estis laŭtlecita oficiala gratulletero de la ministro–Protektanto de Infanaj Leĝoj en Pollando:

*Kara Maciek!*

*Mi sincere gratulas vin pro ĝisnunaj atingoj. Mi deziras al vi, ke vi plu kreive evoluigu viajn eblecojn. Tio, kion vi faras, ekestu por vi fonto de ĝojo kaj kontento.*

*Kun plej bonaj salutoj*

*(—) Paweł Jaros.*

Parolis honoraj gastoj, inter kiuj invititaj Stanisław Mandrak, nome de PEA, kaj subskribinto, kiel eldonisto de la libro.

Post arta kaj oficiala partoj, Maciek subskribadis librojn, ĵurnalistoj denove faris intervjuojn, instruistoj aĉetadis la libron, solene promesante, ke ili mem eklernos la lingvon.

Dume oni servis kafon, teon, kaj dolĉigis partoprenantojn per kuketoj.

**Kazimierz Leja**

# Pola Esperanto–Junularo

Dum malfermaj tagoj de Internacia Studumo pri Turismo kaj Kulturo en Bydgoszcz inter 30.01. kaj 1.02. okazis kunveno de junaj esperantistoj el Pollando. En la renkontiĝo partoprenis membroj de junulara esperantista klubo „Varsovia Vento”: Michał, Janusz (reprezentanto de Kielce), Irmina kaj studentoj de Internacia Studumo pri Turismo kaj Kulturo: Basia, Marzena, Agnieszka kaj Ĉiko (reprezentanto de Mongolio).

Malgraŭ tio, ke estis malmulte da partoprenantoj, tiuj du tagoj estis sukcesaj. Ni decidis reaktivigi Polan Esperanto–Junularon (PEJ), kiu dum du lastaj jaroj tute ne agis. Ni konkludis, ke problemoj de PEJ estas manko de membroj kaj ankaŭ malbona komunikado inter esperantistoj, tial ni kreis en Interreto diskutliston, kiu komence rolos kiel virtuala PEJ. Dum la renkontiĝo ni serĉis en la reto kontaktojn kun junaj esperantistoj, verkis novan regularon de PEJ, kaj fine formis provizoran estraron, kies tasko estos kontroli kunigadon de PEJ kaj maĵe formi novan estraron.

Ni havas grandan peton al la legantoj de Pola Esperantisto! Ni nun kolektas ret- kaj kontakt-adresojn de personoj interesigantaj pri agado kaj membriĝo en PEJ. Se vi estas maksimume 30-jaraĝa, almenaŭ portempe loĝas en Pollando kaj volas agi kun ni, bonvolu aliĝi al diskutlisto:

[http://groups.yahoo.com/group/pola\\_esperanto\\_junularo/](http://groups.yahoo.com/group/pola_esperanto_junularo/) aŭ skribi al: Michał Wyszogrodzki, Solec 83 m 47, 00–382 Warszawa.

Se vi konas aliajn junajn esperantistojn, bonvolu transsendi tiun mesaĝon al ili. La personoj, kiuj ne havas aliron al Interreto, povas kontaktiĝi telefone kun Irmina: 505–529–304 aŭ (22) 6198701.

Raportis:

**Irmina Szustak kaj Janusz Myzik**



Karaj amikoj,

Barbara Liberska, juna, inteligenta kaj entuziasma esperantistino el Poznań, organizas grupon de polaj esperantistoj (kaj el najbaraj landoj) por iri la 9an de majo al la manifestacio kiu okazos en Strasburgo, antaŭ la Eŭropa Parlamento.

Mi sendas al ŝi la adresojn de polaj esperantistoj, agemaj, kiujn eventuale ŝi povas kontakti. Se vi havas intereson en tiu grava projekto, bonvolu kontakti ŝin rekte. Ŝia adreso estas:

[nona922001@yahoo.com](mailto:nona922001@yahoo.com)

Ne hezitu helpi ŝin, kaj bonvolu diskonigi la informon inter viaj konatuloj.

Pli da detaloj ĉe:

<http://europa.bunto.free.fr/>

Salutojn kaj koran dankon.

**Augusto Casquero**

## FREŜO'04

Frusomera Renkontiĝo Esperanta Ŝokanta Obstinulojn (t.e. E-kviza okazantaĵo kun premioj) — 30 jun-04 jul. 2004 Olsztyn (Pollando).

Aliĝado:

Marian Zdankowski, ul. Limanowskiego 4, PL 10-343 Olsztyn.

Rete: avolamer@ols.vectranet.pl kaj: angiel@polbox.com.

Programo: krom kvizoj — prelegoj, ekskursoj ktp.

[www.ema.z.pl/esperanto](http://www.ema.z.pl/esperanto)

Pri Freŝo emfazis: „...neforgesebla aranĝo...” — *El Popola Ĉinio*; „...eble la plej fama kviza programo en Esperantujo...” — *La Ondo de Esperanto*.



## SIMPOZIO PRI ESENCO KAJ ESTONTECO DE ESPERANTIO

Kultura Centro Esperantista organizos simpozion pri esenco kaj estonteco de Esperantio, en Ĉaŭdefono 7-13 de aŭgusto 2004, kadre de pli vasta Kultura Esperanto-Semajno (strukturo simila al KEF kaj KAFE).

KCE invitos famajn aktivulojn de ĉiuj tendencoj: de la raŭmismaj ĝis la diversaj finvenkismaj skoloj. La celo estas renkonto analoga al tiu apud Varsovio 1994, kunvokita de la tiama PEA, prezidata de la raŭmismaj sociologo Jerzy Leyk, sub la titolo ‘Strategiaj demandoj de la Esperanto-Komunumo’. Por informoj: [kce.esperanto@bluewin.ch](mailto:kce.esperanto@bluewin.ch)

**Heroldo Komunikas**

## INTERNACIA TURISMA KONGRESO EN POLLANDO

La „1a Kongreso de Internacia Esperanto-Turismo” okazos en la belega kaj historia urbo Malbork (Pollando), 17-21a de julio 2004.

Oni povas vidi la urbon en Interreto ĉe la adreso: [www.malbork.pl](http://www.malbork.pl).

Baldaŭ ĉiuj informoj de ĉi tiu ttt-paĝaro aperos ankaŭ en Esperanto kaj krom ili aliĝiloj, programo, informado pri loĝejoj, ktp. Ĉefa celo estas reorganizi la internacian turisman Esperanto-organizon, kiu praktike malaperis post la malfondo de Monda Turismo.

Dum la kongreso oni elektos gvidantojn kaj kunlaborantojn inter tiuj kiuj agas tiukampe. Ĉiuj estas elkore bonvenaj. Ni atendas viajn proponojn kaj sugestojn.

Elkore dankas kaj salutas:

**Augusto Casquero**



## Jen la informo el Interreto:

Projekto „Esperanto — integracio sur la bazo de arto” ricevis bonegajn recenzojn ĉe Pola Ministerio pri Kulturo kaj Nacia Centro pri Kulturo. Nun ni povas gajni fondusojn de UE. Se ni sukcesos — ni konstruos en Bjalistoko novan muzeon: parte al Ludoviko parte al familio de pentristoj Ŝledziński. Jam estas fiksita loko kaj projekto.

Kun salutoj:

**Prezidantino de Bjalistoka Esperanto-Societo**

[esperanto.bialystok@interia.pl](mailto:esperanto.bialystok@interia.pl)

## **INTERNACIA ESPERANTO–SEMAJNO DE KULTURO KAJ TURISMO (Salou, Hispanio, 2–9 de oktobro 2004)**

### **Premio Ada Sikorska-Fighiera**

La Organiza Komitato de la Internacia Esperanto–Semajno decidis starigi jaran premion je la nomo de Ada Sikorska–Fighiera, destinitan al esperantisto aŭ esperantistino, kiu akiris gravajn meritojn en la laboro por Esperanto.

La premio konsistas el medalo, sur kiu, krom la nomo de la Internacia Esperanto–Semajno, aperos reliefa bildo de Ada Sikorska–Fighiera kaj, dorse, la gravurita nomo de la premiito, dato kaj loko de la Semajno.

#### **Celo**

La premio celas publike agnoski gravan kaj sindediĉan laboron por la bela ideo de esperantismo faritan de meritplena esperantisto aŭ esperantistino en kiu ajn loko de la mondo.

Donante al la Premio la nomon de la forpasinta kaj ĉies amata Ada Sikorska–Fighiera, kiu ĝis sia morto konstante laboris por Esperanto (inter alie eldonante sinsekve en Bruselo, Madrido kaj Torino dum 34 jaroj la tiaman gazeton „Heroldo de Esperanto”), la Organiza Komitato intencas stimuli la esperantistojn sekvi ŝian noblan ekzemplon je la servo de nia kara idealo.

### **Kandidatigoj**

La proponoj por la Premio devas esti alsenditaj de loka, nacia aŭ internacia Esperanto–Grupo, Klubo, Societo aŭ Organizo, antaŭ la 1a de septembro 2004, al la prezidanto de la Premia Komisiono: G.C. Fighiera, Via Sandre 15, IT–10078 Venaria Reale (To), Italio. Faksilo: (+Italio) 11 226 30 78.

### **Premia Komisiono**

La Premia Komisiono konsistas el: Luis Serrano Pérez, Santiago Tornè, Emilio Sanz kaj Salvador Aragaj.



### **Internacia Televido**

Estimataj

Mi, Flavio Rebelo, nome de la grupo kiu strebadas por la lanĉo de ITV (Internacia Televido), la unua interreta televidkanalo tute en Esperanto, estos en Varsovio de la 27a ĝis la 28a de februaro, por kontakti la lokajn esperantistojn kaj prelegi pri Projekto ITV. Mi tre dankos, se oni kontaktos lokajn E–klubojn kaj esperantistojn en tiu regiono, por ke tiuj analizu la eblecon disponigi al mi ejon kaj horon por prelegi. Mi profitu la okazon por peti, se eble, ke estu televidilo kun DVD–legilo, aŭ komputilo, kiu legos DVD, por ke mi prezentu al la ĉeestantoj nian 7–minutan filmeton pri ITV kaj kelkajn en la vinjetojn de la estontaj televidprogramoj.

Kiel legeblas ĉe la portalo pri ITV (<http://gxangalo.com/televido>), nece-



sos ne nur prelegejoj kaj horo. La celo de mia vojaĝo al Eŭropo estas enspezi monon por la televidkanalo, kaj ne por elspezi ĝian malmultan kapitalon. Se lokaj esperantistoj povas ankaŭ kontakti aliajn esperantistojn el Varsovio kaj Pollando, avizante ilin pri mia alveno kaj prelego, oni ŝparus al mi multon da telefonvokoj internaciaj.

Ankaŭ evidentiĝas la bezono esti gastigata de iu helpema esperantisto el Varsovio (mi devas tranokti de la 27a ĝis la 28a de februaro, kiam mi foriros, nokte, per trajno, aŭ frumatene de la 29a, aviadile — ĉi-okaze, plia tranokto). Mi ne estas postulema homo, kaj se estos lito, kaj manĝoj, mi absolute silentos pri ĉiuj aliaj kondiĉoj. Mi ne fumas, ne drinkas, ne uzas drogaĉojn, kaj restos grandan parton de mia tempo en la urbo, kontaktante homojn por ITV, por Ĝangalo kaj por aliaj projektoj niaj. Ankaŭ helpas la sendado de informoj pri la tiama vetero en Varsovio, por ke mi ne uzu ŝorton kiam neĝas, aŭ inverse. Ni en Brazilo ne havas tiom rigoran veteron, kiel vi en Eŭropo.

Havas mi kroman peton — se la varsoviaj esperantistoj povas disponigi al mi, dum tiu tago, varsovia non, junan aŭ ne, viron aŭ virinon, kiu povas iri kun mi al specifaj lokoj de la urbo, por ke mia tempo tie estu plene fruktodona, mi estos plendanka. Mi atingos la urbon je la supre menciita dato, mantere, veninta de Berlino per trajno, kaj mi ne disponos je multe da tempo en Varsovio, tial la hipotezo perdiĝi en la

urbo, pro manko de ĉiĉerono aŭ gvidanto, ne povas okazi.

Atendante do pozitivan reagon, via

**Flavio Rebelo**  
**Ĉefredaktisto de E-portaloj Ĝangalo**  
**flavio@gxangalo.com**

*Revo, kiun ni revas sole, restas nur revo. Revo, kiun ni revas kune, iĝas realo.*



## Blinduloj esperantistaj

Kujavia kaj Pomerelia Asocio de Blinduloj en Bydgoszcz, Pollando, volas havi sian Esperantan sekcion. Nun ni partoprenas Esperantan kurson kaj ni lernas la lingvon. Fine de januaro (post du semajnoj) ni havos ekzamenon. La 18an de decembro ni organizis (unuan fojon) Esperantan vesperon intence al 144a naskiĝdatreveno de Ludoviko Zamenhof. Tio estis tre agrabla vespero, blinduloj legis en brajlo Esperantajn versaĵojn, estis Esperanta muziko kaj amika etoso kun aliaj esperantistoj de urbo Bydgoszcz.

En januaro ni planas fini kurson per ekzameno de Internacia Esperanta Instituto. Poste ĉiumonate (unuan jaŭdon de monato) ni planas renkontojn kun aliaj esperantistoj. Februare ni volas inviti esperantinon, kiu belege deklamos polajn versaĵojn tradukitajn al Esperanto. Marte ni planas muzikan vesperon kaj poste... ni serĉos novan temon... kun aliaj blindaj esperantistoj.

Ĉu ekzistas Esperanta ĵurnalo brajle? Blinduloj volas havi diversajn kontaktojn kun aliaj esperantistoj. Mi havas multe da demandoj. Dek blinduloj volas korespondi brajle en Esperanto. Ankaŭ ili volas scii, kiamaniere atingi Esperantan literaturon en brajlo. Bedaŭrinde nur tri homoj uzas komputilon kaj aliaj nur brajlajn skribmaŝinojn.

Ĉu vi povas helpi al mi kaj klarigi, kion mi devus fari pri tiu temo? Kun kiuj homoj mi povus kontakti? Mi estos tre dankema se vi helpos al mi. Nun ni kore salutas Vin kaj bondeziRAS ĉion bonan.

**Helena Skonieczka**  
**str. Chłodna 23a**  
**85-345 Bydgoszcz**  
**tel. (+48 52) 32 37 099**



## **Internacia Esperanto-Feriado**

Estimataj gesamideanoj,

Silezia Esperanto-Asocio elkore invitas al 38a Internacia Esperanto-Feriado en Kudowa Zdrój, kiu okazos dum la tagoj 16-27.08.2004.

La feriado okazos en Kudowa Zdrój, unu el la plej popularaj kuraclokoj en Pollando. Kudowa de jarcentoj famas pro miraklaj ecoj de lokaj minerala akvo kaj klimato kiuj fortikigas malsanulojn je koro, anemio, digesto kaj spirado. La urbo kun ĉirkaŭaĵo abundas je atrakciaĵoj. Precipe popularaj estas apudaj Tablaj Montoj kun rokaĵ labirintoj kaj vidterasoĵ.

Por nia feriado ni elektis du domojn kun diversaj restadkondiĉoj, kio ebligas alĝustigi restadkostojn al diversaj financaj povoj kaj plaĉoj. Ni ĉiuj komune manĝos en apuda restoracio.

Aliĝilojn bonvolu peti de, kaj reŝendi ĝis la fino de aprilo al:

Silezia Esperanto-Asocio, ul. Dubois 3/1, PL 50-208 Wrocław, aŭ rete: [wroclavo@poczta.onet.pl](mailto:wroclavo@poczta.onet.pl).



## **Novaj ret-adresoj**

La Filio de PEA en Bytom lige de la 750-jara urba jubileo invias al retpaĝo: [www.esperantobytom.republika.pl](http://www.esperantobytom.republika.pl)



Internacia Centro pri Turismo kaj Kulturo en Bydgoszcz preparas novan hejmpaĝon—[www.esperanto-turismo.com](http://www.esperanto-turismo.com) kun historia parto pri Monda Turismo.

Aktualaj ret-adresoj estas:

[andreo@rubikon.net.pl](mailto:andreo@rubikon.net.pl) — por INTERNACIA CENTRO PRI KULTURO KAJ TURISMO

[info@esperanto-turismo.com](mailto:info@esperanto-turismo.com) — por INTERNACIA KLUBO „ESPERANTOTUR”

[stud@esperanto-turismo.com](mailto:stud@esperanto-turismo.com) — por INTERNACIA STUDUMO PRI TURISMO KAJ KULTURO

[pej@esperanto-turismo.com](mailto:pej@esperanto-turismo.com) — por POLA ESPERANTO-JUNULARO.

Aktuala telefonnumero kaj fakso: (+48 52) 346 11 51.

*Estimata Redaktoro!*

Sekve de mia pasintjara letero, mi denove respondas al via alvoko en redaktora artikolo (*PE* 3/2003).

Multaj esperantistoj atendas paciencie por, dufoje en la jaro, dum la papa mesaĝo „Urbi et Orbi”, aŭskulti kelkajn vortojn eldiritajn de papo en Esperanto. Esperantistoj ĝojas pro tio, kaj opinias, ke papo apogas Esperanton. Tio estas granda iluzio. Tre eminentaj ekleziaj esperantistoj multe laboris, petegis kaj preĝis por instigi papon elparoli nur tiujn kelkajn vortojn en Esperanto.

Papo interesiĝas pri Esperanto en la sama grado, kiel Bush, Blair, Chirac, Schröder kaj aliaj grandaj politikistoj. Se papo estus favora al Esperanto, tiam li ordonus, aŭ almenaŭ rekomendus, instrui Esperanton en porpastraj seminarioj de romkatolika eklezio. Tiam pastroj de diversaj landoj povus pli facile interkompreniĝi.

Sed ĝuste tio estus danĝera por la eklezio. Ĉiuj ideoj en ĝi devas descendi de supre, de papo al pastroj, sed ne inter la pastroj. Tio povus plifaciligi opozician agadon de pastroj kontraŭ la papo. En eklezio ne regas demokratio, sed estas diktaturo de papo.

Do, karaj esperantistoj, ne esperu, ke papo vere apogas Esperanton, ne estu naivaj. Tio ne estas en intereso de eklezio, kiun la papo, anstataŭanto de Dio sur tero, reprezentas. Li certe tiun stultajon ne faros.

**Władysław Burszta, Zabrze**

**„Kiam fortoj malaperas tiam morto savas”.**

*La 2an de februaro 2004 j. forpasis en aĝo de 83 jaroj merita esperantisto **Józef Paweł Bieliński**, Honora Membro de Pola Esperanto Asocio, honorigita pro meritoj por urbo Bydgoszcz kaj por kulturo, aŭtoro de kelkaj Esperanto-lernolibroj kaj Esperanto-instrumentaloj, dum longaj tempoj prezidanto de Pola Esperanto-Asocio en Bydgoszcz.*

*La entombigo okazis vendrede, la 6an de februaro je la horo 12.30 en Bydgoszcz – Tombarejo Belawki, ĉe Aleo de Kardinalo Wyszyński.*

*Tristaj anoj de Kujavia-Pomerelia Filio de Pola Esperanto Asocio kaj Internacia Centro pri Kulturo kaj Turismo en Bydgoszcz, Pollando*

### **Eldonejo HEJME aktuale proponas:**

1. Maciej Zgondek, *Iĝu esperantisto! Samouczek języka esperanto*. Kompletaj kaj kompetentaj lernolibroj por poloj, de 14-jara aŭtoro. Prezo 20 PLN.

2. SAT-Amikaro, *Esperanto Junul-Kurso*. Fama lernolibro por „rekta metodo” de instruado. Prezo 12 PLN.

3. Zofia Banet-Fornalowa, *Antoni Grabowski — eminenta Esperanto-aganto*, 2a eldono. Prezo 24 PLN.

Baldaŭ aperos 2 novaj lernolibroj!

Se vi volas/povas helpi nian eldonan agadon, nepre kontaktu la eldoniston! Por lokaj kluboj kaj revendistoj ni havas specialajn rabatitajn prezojn (por lernolibroj).

# Kiamaniere edukadi rasajn huliganojn? ( 10 ordonoj por gepatroj )

1. Komence de plej fruaj jaroj donadu al infano ĉion, kion ĝi deziras.
2. Ridu aŭdante ĝiajn maldecajn kaj vulgarajn vortojn. Ĝi konsideros sin saĝa kaj ŝercema.
3. Flankigu ĝin de ĉiuj influoj de etikaj sistemoj. Kiam ĝi elkreskos, elektos mem iun mondkoncepton.
4. Ne diru al infano, ke ĝi kondutas malbone. Neniam diru tion. Malbonŝanculo pretas kapti kulpo–komplekson. Kaj kio okazos, kiam pli poste okazos iu malfeliĉo — ekz. kiam ĝin oni arestos kiel ŝteliston de aŭtomobilo? Kiel grande ŝi/li suferados en la konvinko, ke la tuta socio ĉikanas ŝin/lin.
5. Laŭprincipe faru por infano ĉion; kiam ĝi disĵetos amuzilojn ĉirkaŭ sia amuzteritorio, kolektu ilin vi mem kaj metu al la konvena loko. Tiamaniere la infano konvinkigos, ke respondeco por tio, kion ĝi faradas, ne apartenas al ĝi, sed al ĉirkaŭinta ĝin prsonaro.
6. Permesu al infano legadi ĉion, ĉion spektadi en TV, ĉion gustumi. Nur tiamaniere ĝi ekspertos kaj ekkonos, kio estas por ĝi bona kaj kio malbona.
7. Kverelu ĉiam en la ĉeesto de infano. Kiam via edziĝo disfalos, la infano ne estos ŝokita.
8. Donu al ĝi tiom da mono, kiom da ĝi ekdeziras. La infano ne devu perlabori monon. Estus afero tragedia, se ankaŭ ĝi devus turmentiĝi tiel, kiel iam vi mem.
9. Kontentigu ĉiujn ĝiajn dezirojn. Ĝi nutru sin kiel eble plej bone, uzu drinkaĵojn kaj narkotikaĵojn, ĝi havu ĉiujn oportunojn. Se ĝi eksentus ian mankon, ĝi estiĝus homo nervoza kaj kompleksema.
10. Starigu ĉion en defendado de via infano. Egale kun kiu ĝi estas en konflikto — kun polico, instruisto aŭ najbaro. Oni ne povas permesi ekfari por ĝi maljustaĵojn flanke de iu ajn persono; nur ĝi — via infano, povas senpune fari maljustaĵojn al aliaj (komence de avino, kamaradoj, ktp.).

Se malgraŭ libereco kaj privilegioj, se malgraŭ tiom da pruvoj de via gepatra amo, via infano prosperos al vi kaj ĝi ne elkreskos kiel huligano, vi ne devos kulpiĝi vin mem. Vi faris ĉion eblan, por difektigi ĝin. Certe VIA INFANO ne komprenis vian oferemon.

(Mesaĝo de Polico en Kędzierzyn Koźle, distrikto Opole, PL)  
tradukis: Stanisław Śmigieński